

1977 novembro

70-a jaro

n-ro 863 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



Spektakloj kaj lecionoj:
Dek pupteatraj festivaloj en Zagreb

Vi trovos

ke ni ĉi-foje dediĉas niajn enkondukajn paĝojn al aferoj, kiuj laŭ iuj establitaj opinioj devus aparteni al la lasta parto de serioza periodaĵo. Tio kion ni faras estas do atenco al la establitaj kutimoj. Kiel kutime en nia kazo, nia atenco estas intenca. Cetere, la pupoj de la zagreba festivalo faris por la afero de la Internacia Lingvo dum la lastaj jaroj multe pli ol multaj aktivuloj el sango kaj karno. En tiu grandega informa laboro, tiel por popularigi la puparton, kiel por informi kaj instrui pri Esperanto, la pupoj montriĝis ĉiopovaj, ĝuste kiel ili kapablas kondukti sur siaj etaj grandsignifaj scenejoj.

Sed, pupoj estas pura poezio, dum ni devas atentigi vin pri tute proza afero: Estas jam novembro, baldaŭ venos la jarfino, kaj tio ĉiam estis tempo por pagi siajn abonojn kaj kotizojn. Ju pli frue vi faros vian pagon de la venontjara abono, des pli vi faciligos la laboron de la Centra Oficejo de UEA. Krome, ĉu indas riski, ke iu el la sekvontaj numeroj de la revuo maltrafu vin pro malfrue pagita abonkoto? Ni ja preparas iom da agrablaj surprizoj por vi dum la venonta jaro. Ion plian ni ne malkaŝos nun! Ĝis decembro!

Enhavo

- 181 Lingvo en la praktiko: Dekjara persisto, Dek Pupteatra Internacia Festivalo: Pupoj gastos en Norvegio (Spomenka Štimec)
- 183 Universitato de Unuiĝintaj Nacioj: Kiel praktiki la sciencon? (J. Hester)
- 185 Denove pri "Inuk": Ĝis frenezorando (J. Régulo)
- 186 Informoj de CED: Pri kelkaj terminoj (Detlev Blanke)
- 187 Reĥoj: Denove pri vortordo (W. Auld)
- 188 Du datrevenoj de E. Boirac: Filozofo kaj esperantisto (Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux)
- 189 Domo por JEI, Universitataj lekcioj
- 190 Leterkesto (Vetter, Schulze, Majchert, Tuinder, Tyynelä, Thaillet, Corsetti, Kawasaki)
- 191 Recenzoj ("Pri internacia lingvo dum jarcentoj", "Jen nia mondo", "Malnovaj rakontoj en Takatuki")
- 193 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 194 TEJO-paĝo: 34a IJK: TEJO en Tarnovo, Raporto pri la landaj sekcioj: Kiom grandas TEJO?, Israela vojaĝo (A. Wandel)
- 195 Kongresa komunikado — novaĵoj pri la 63a Universala Kongreso en Varno
- 196 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 198 Esperanto en radio (kompleta tabelo)
- 199 Ekzameno E (Bernard Golden), Oficiala informilo el la CO de UEA
- 200 Nekrologoj, Anoncetoj

La kovrilo

Nia kovrila bildo ĉi-foje prezentas rolulojn en la spektaklo "La dormanta belulino" de la Ŝtata Pupteatro en Varno (Bulgario). Tiu teatraĵo ĵus ravis la spektantojn en la 10a Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo (Jugoslavio) kaj viciĝis inter la premiitojn de la jubilea PIF. Ĉu almenaŭ la koincido, ke la venontjara Universala Kongreso okazos en la hejma urbo de tiu premiita teatro helpas, ke la spektaklon ĝuu ankaŭ la internacia kongresa publiko? Estas jam tempo lerni, ke la pupteatra arto neniel estas rezervita ekskluzive por la etula publiko, ĉar ĝi iam ja komenciĝis kiel plenkreskula arto kaj ankoraŭ kapablas diri al ni multajn aferojn en maniero pli teatreca ol tion faras multaj el la t.n. veraj teatroj. Ni do atendu kaj esperu remalkovri la pupteatran arton venontjare en Varno.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mińsk, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Dekjara persisto

KUN LONGA movada historio kaj sia legendiĝinta Akademia Esperanto-Klubo (inter la du mondmilitoj), Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio (Jugoslavio), ankaŭ nun okupas iom specialan kaj bedaŭrinde ekskluzivan lokon en la Esperanto-movado. Ĝi estas tiu punkto de la mondmapo, kie la Internacia Lingvo plej intense vivas en la praktiko. Lasante flanken la kutiman movadan vivon de la Esperanto-klubo — kaj pluraj el ili aktivas en Zagrebo —, ni menciuj nur kelkajn el la zagrebaj aplikoj de la Internacia Lingvo: Jam preskaŭ kvaronan jarcenton Esperanto estas elsendolingvo de la tiea radio-stacio. *ZET*, monata gazeto de la urbtrafika entrepreno, jam 18 jarojn plenigas unu el siaj paĝoj per fakaj novaĵoj el la urboj de la mondo kaj resumoj en Esperanto. Estas menciinda unikaĵo, ke tiuj informoj



Plenkreskuloj lernu: Ni solvis la lingvan problemon kaj nun ĝuas diverslandajn spektaklojn en la Internacia Lingvo.

atingas la gazeton pere de la Internacia Lingvo. Se ne kalkuli la oficejojn de kelkaj internaciaj kaj landaj organizaĵoj, Zagrebo estas unu el malmultaj lokoj en la mondo, kiuj havas sian memstaran Esperantan entreprenon. Tio estas Internacia Kultura Servo, kiu enhavas eldonejojn kaj presejojn, organizas internaciajn kunvenojn, funkcias kiel vojaĝagentejo ktp. Jam 15 jarojn, el Zagrebo venas al ni *Homo kaj kosmo*, popularscienca astronomia revuo, kiun eldonas la Zagreba Observatorio. La urbo havas ankaŭ teatran trupon, kiu, malgraŭ sia modesta nomo — Drama Sekcio de Studenta Esperanto-Klubo —, prezentigis en multaj landoj kaj en multaj Esperanto-kongresoj, inkluzive la plej grandajn.

Tamen, tio kio pleje portas al Zagrebo la epiteton "urbo de la apliko" estas sendube la Pupteatra Internacia Festivalo, plej ofte menciata per sia mallonga nomo PIF. Nia sekva kontribuaĵo resumas, iom tro skize, la dekjaran persiston de la sola konstanta festivalo, kiu okazas en la Internacia Lingvo. Post dek jaroj, PIF estas renoma internacia institucio, sed samtempe grava instruo por la Movado. Oni antaŭ kelkaj jaroj cerbumis, ĉu ne estas jam tempo, ke la Movado elektu inter "uneskismo" kaj "pupismo". Tia elekto superfluas, ĉar ne ekzistas gravaj kaj malgravaj fakoj aŭ laborkampoj, sed la agado mem atribuas al ili unu el tiuj epitetoj. PIF pafas al ni tiurilatan lecionon. Ĉar, kvankam unuavice turnita al la infanoj, la Festivalo pere de la televido kaptis intereson ankaŭ de la ĝenerala publiko, por kiu ĝi estis duobla malkovro — tiel de la Internacia Lingvo, kiel de la iom forgesita teatra mondo de la praa puparto, kiu lastatempe notas plenan reaktualigon kaj atentigas, ke ĝi ankaŭ al la plenkreskuloj ankoraŭ ne liveris sian lastan vorton.

10a PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO:

Pupoj gastos en Norvegio

ZAGREB ĉi-oktobre por la deka fojo fariĝis gastiganto de internacia teatra festivalo uzanta Esperanton kiel scenlingvon. Temas pri PIF — Pupteatra Internacia Festivalo.

Ne hazarde pupteatristoj ludas en Esperanto: pupteatra arto adresas sin unuavice al la plej juna loĝantaro, klopodante eduki ĝin. La ideo ligi tiun unuan edukprovon ĉe infanoj kun la mesaĝo pri neŭtrala internacia komunikado dum la pasinta jardeko ne montriĝis maltrafa. Dum 10 jaroj PIF venigis al Zagreb 67 pupteatrojn, el 14 landoj, kiuj plenumis 577 prezentaĵojn. La jugoslavia televida reto elsendis 7 spektaklojn, filmitajn dum PIF en Esperanto.

Iom post iom en Jugoslavio naturiĝis opinio, ke internaciaj pupoj parolu internacie. La 10a PIF adresas sin al la festivalo de internacia organizaĵo de pupistoj en

Moskvo kun peto, ke ĝi akceptu Esperanton kiel sian oficialan lingvon.

La jubilea PIF kolektis en Zagreb la plej grandajn sukcesojn de la pasinta pupteatra sezono: 14 prezentaĵojn, plenumitajn de pupensembloj el Oran (Alĝerio), Varna (Bulgario), Poznan kaj Rzeszow (Pollando),

PREMIITOJ DE LA 10a PIF

FAKA jurio, konsistanta el Borislav Mrkšić (Zagrebo), Maria Signorelli (Romo) kaj Joan Andreu Valve (Barcelono), premiis en la sekcio A ("Pupoj parolas al infanoj") la Pupteatron el Varno (Bulgario) por *La dormanta belulino* de C. Perrot kaj J. Sotirov; en la sekcio B ("Novaj esploroj en puparto") la premio iris al la Pupteatro "Jože Pengov" el Ljubljana (Jugoslavio) por la prezentaĵo de *Reĝo Matjaž kaj Alenčica*. La ĝeneralan premion de la 10a Pupteatra Internacia Festivalo gajnis *La princo de Portugalio* de J. Kanuth, en la prezento de la Ŝtata masko-teatro "Kacperek" el Rzeszow (Pollando). Alia pola teatro – "Marcinek" el Poznań – per sia spektaklo *Tigrido* gajnis premion pro la kvalito de sia uzo de Esperanto kiel scenlingvo. La saman premion ricevis ankaŭ la prezentaĵo de *La dormanta belulino* el Varno. Unuopajn aktorajn premiojn por senriproĉa uzo de la Internacia Lingvo gajnis ge-aktoroj Júlia Sigmond, Zoltán Balló kaj Dejika Doini, ĉiuj el Cluj-Napoca (Rumanio). Internacia infana ĵurio unuanime voĉdonis por la pola muzikalo *Tigrido*.

Cluj-Napoca kaj Bacau (Rumanio) kaj Banjaluka, Mari-bor, Ljubljana, Zadar kaj Zagreb (Jugoslavio).

Iuj spektakloj parolis al infanoj per temoj kaj rekvizitoj proksimaj al ili, aliaj prezentaĵoj turnis sin al plenkreskuloj montrante la fontojn de tiu praa arto aŭ la nove serĉatajn vojojn.


La festivala semajno pliriĉigis la kroatan porinfanan kulturon per 58 spektakloj. La Televido Zagreb filmis prezentaĵojn de la alĝeria kaj rumana ensembloj por plie disvastigi ties nuntempajn atingajojn.

Ankaŭ ĉi-jare PIF havis internacian publikon. La Festivalon, nome de la aŭspicianto – UEA, malfermis d-rino Flora Szabó-Felső. Lingvan diversecon de la publiko buntigis kelkaj TEJO-anoj kaj sesdeko da infanoj el Hungario, Italio kaj Jugoslavio, konsistiganta internacian infanan ĵurion.

Aparte signifa montriĝis la ĉeesto de dekmembra delegitaro de la norvega urbo Tromsø, ĝemelurbo de Zagreb. Vidinte la Festivalon la urbestro de Tromsø, s-ro Helge Jacobsen, invitis PIF gastojn en Norvegio en junio 1978.

Tiu invito ne estis hazarda. Ĝi realigas celotan vastiĝon de la Festivalo. Per ĝi la dekjara PIF transpaŝas la landlimojn, en kiuj ĝi evoluiĝis, kaj planas paralelan okaziĝon junie en Norvegio, oktobre en Jugoslavio. Internacia Kultura Servo, kiel organizanto, esperas, ke estonte la landoj inter Tromsø kaj Zagreb ne restos fermitaj por tiu manifestacio. En ĝi Esperanto aperas ne kiel kuriozaĵo sed kiel funkcia komunikilo.

Spomenka Štimec



En la deka pupteatra pireteknikaĵo, komence de oktobro en Zagrebo, rolis i.a. ankaŭ ĉi tiuj moŝtoj kaj gravaj personecoj.



UNIVERSITATO DE UNUIGINTAJ NACIOJ:

Kiel praktiki la sciencan?

Nia revuo jam plurfoje raportis pri la ideoj starigi internacian institucion de supera edukado kaj organizi ĝin tiel, ke ĝi unuflanke rezignu pri tradiciaj anakronismaj akademiaĵoj, kaj aliflanke forte konsideru la bezonojn de la hodiaŭa mondo (v. nian revuon de januaro 1971, p.2). Estinte longtempe nur projekto kaj bela revo, la nova institucio de UN materie proksimiĝis al realo nur dank' al malavara japana monkontribuo. Tamen, eĉ se solviĝos la materiaj problemoj de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, restas ankoraŭ longa vojo ĝis tiu laŭnome monda institucio fariĝos tia ankaŭ laŭ siaj bazaj konceptoj kaj praktikado de novaj ideoj en la supera edukado. Plurlingva — almenaŭ oficiale —, laŭ la modelo de UN mem, la Universitato jam dekomence spertas la gravecon de la lingva problemo. Ĝi tamen ankoraŭ ne okupiĝas pri tiu aspekto de sia funkciado. Ĉu, interalie, pro tio dume kreiĝis kvazaŭ konkurenca Universitato de la Tria Mondo? Foje ni planas raportoj ankaŭ pri tiu institucio, samkiel pri la lingva aspekto de UUN, kiun ni prezentas ĉi tie.

LA UNIVERSITATO de Unuiĝintaj Nacioj (UUN) ne estas universitato en la kutima senco. Ĝi havas la

nomon universitato, ĉar kiam U Thant, tiama ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, proponis la projekton, oni antaŭvidis, ke ĝi estos tradicia universitato kun fakoj kaj studentoj, kiuj studos internaciajn temojn.

Sed poste evidentiĝis, ke la mondo ĉefe bezonas institucion de Unuiĝintaj Nacioj, kiu helpu kunligi instancojn traktantajn similajn problemojn tra la mondo, kaj plifortigu ilian kapablon realigi esplorojn kaj altnivelan trejnadon en tio, kion la Ĉarto de la Universitato de UN nomas "premaj tutmondaj problemoj de homa pluvivado, evoluo kaj bonfarto".

Volontulaj kontribuoj. Aliaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj estas gvidataj de reprezentantoj de registaroj; sed UUN estas regata de reprezentantoj de la akademia medio, kiuj servas kiel individuoj kaj ne kiel reprezentantoj de siaj registaroj. Ni ne ricevas monon de Unuiĝintaj Nacioj aŭ de Unesko. Ni ricevas nedevigajn kontribuojn al kapitala fonduso, lanĉita per la tre sindona promeso de Japanio disponigi cent milionojn da dolaroj. Ni celas aldoni al tio ankoraŭ kvarcent milionojn da dolaroj, tiel ke ni havu fonduson kiu produkti enspezon de 25 ĝis 40 milionoj da dolaroj jare. Japanio anoncis ankaŭ sian pretecon konstrui sidejon de la Universitato en Tokio.

Intertempe stariĝis la gvida konsilio, kiu konsistas el sciencaj eminentuloj kaj konataj civitanoj el 24

landoj, kaj ni komencis la laboron de la Universitato. Ni starigis tri komitatojn de specialistoj en la bazaj sektoroj: monda malsato, homa kaj socia evoluigo, utiligo kaj prizorgo de naturaj rimedoj.


Ni petis al tiuj specialistoj informi nin, kiajn strategiojn UUN sekvu por efike eluzi sian tutmondan mandaton, por ne duobligi laboron jam faratan kaj por plej praktike profitigi la popolojn de la mondo.

Kiam temas pri malsato, oni rekomendis, ke ni koncentru niajn fortojn je temoj kiel, ekzemple, post-rikolta konservado de nutraĵoj. Oni taksas, ke dudek ĝis kvardek procentoj de la manĝaĵoj, kiujn oni kreskigas, estas neniam manĝataj de homoj; ili estas manĝataj de ratoj aŭ detruataj de putriĝo. Tial, unu el la aferoj, kiujn ni bezonas, estas eltrovo de procedoj por pli bone prizorgi manĝaĵojn post la rikolto kaj malkovro de pli bonaj metodoj por distribui ilin.

Oni rekomendis ankaŭ, ke ni dediĉu atenton al bazaj nutraj bezonoj. La mondo ne havas sufiĉajn informojn pri la efektivaj bezonoj en la dieto de homoj, kiuj loĝas en diversaj regionoj kun variaj klimatoj, altitudoj kaj ĉirkaŭaĵoj.

Trie, oni rekomendis, ke ni helpu trejni specialistojn por konsili al evoluantaj landoj pri nutrada planado, por preni en konsideron la verajn nutradsajn bezonojn de la homoj. Kaj kvare, oni proponis, ke ni instigu kontaktojn inter specialistoj pri agrikulturo kaj tiuj kiuj okupiĝas pri la problemoj de nutrado.

Kontraŭrevolucio. Multaj konsekvencoj de la tiel-nomata verda revolucio montriĝis kontraŭproduktaj



Ligi la studojn al la praktikaj bezonoj de la hodiaŭa homaro, tio estas unu el la idealoj de la Universitato de UN.

MOVADAJ KONTAKTOJ KUN LA UNIVERSITATO

RESPONDE AL INVITO reprezentiĝi en la Universala Kongreso en Rejkjaviko ĉi-jare, grava funkciulo de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj skribis ankaŭ jenan alineon:

”Ni konsentas kun la konceptoj entenataj en via letero, pri la graveco de lingvaj problemoj en nia hodiaŭa mondo, precipe pri la signifo de lingvaj faktoroj por ekonomia evoluo kaj kultura diverseco. Kvankam nuntempe tio ne estas unu el la prioritataj studobjektoj en la programo de la Universitato, ni ja intencas ekstudi tiun temon en la baldaŭa estonteco, kondiĉe ke ni ricevu por tio la aprobon de la Konsilantaro de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj.”

Tiu leterinterŝanĝo tamen ne estis la sola ĝisnuna kontakto de la Movado kun la Universitato. Jam pasintjare, dum sia vizito al Japanio, ges-roj Woessink vizitis la sidejon de la Universitato en Tokio kaj renkontiĝis kun d-ro A.L. Kwapong, vicrektoro de UUN. Li, same kiel la rektoro de la Universitato — aŭtoro de la apuda artikolo — rekonas la ekziston kaj gravecon de la lingva problemo ankaŭ en la laboro de UUN. Krome, la prezidanto de UEA planas en baldaŭa estonteco renkontiĝi kun d-ro J.M. Hester, rektoro de UUN.

kiam temas pri nutrado, ĉar la agrikulturaj specialistoj ne havis adekvatajn informojn pri nutradsajn bezonoj.

Ni nun elektas instituciojn plifortigendajn sur la kampo de esplorado kaj altnivela trejnado rilate ĉi tiujn gravajn problemojn. Ni jam elektis du: unu, en Gvatemalo, pritraktas nutradsajn; la alia, en Hinda Unio, studas postrikoltan konservadon. Tiu ĉi komenco respegulas la ideon de reto, sur kies bazo funkcias la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj.

Ni multe deziras instigi instituciojn apliki sian scion al praktikaj demandoj. Tio estas unu el la plej malfacilaj aferoj, kiujn iam ajn devas fari universitata diplomito. Estas tre facile, tre komforte verki referaĵojn por publikigo kaj distribuo al aliaj kleruloj, kiuj poste gratulas la verkinton pro ties progreso kaj aljuĝas al li aŭ ŝi premiojn. Sed estas ekstreme malfacile elekti akademiasajn temojn, akademiasajn scion, esplorajn rezultojn kaj apliki ilin al la praktikaj problemoj, kiujn frontas la homoj ĉiutage. Unu el la taskoj, kiujn ni akceptis, estas tiu de malkovro de institucioj, kiuj sukcesas apliki grupon da disciplinoj, ne simple unu aŭ du, al la realaj problemoj kaj al la helpado de homoj en la plibonigo de iliaj vivoj.

La celo de la Universitato de UN estas ĉi tiu: ĝi ne estu teorieca institucio, sed institucio kiu instigu la praktikan aplikadon de la scio, ĉar tio estas unu el la plej altaj formoj de akademiasaj atingoj.

James Hester

(Unesco Features, 705-706)



DENOVE PRI "INUK":

Ĝis frenezorando

MI HAVIS la privilegion ĉeesti la lastan provludon, kaj poste la prezenton de *Inuk*, dramo ludita dum la 62a Universala Kongreso. Ambaŭ fojojn mi restis mutigita de ravo kaj admiro. Nepre temas pri la teatraĵo plej serioza, plej digna, plej klara iam okazinta dum Universala Kongreso de Esperanto. *Inukon* ni devas elekti — kiel oni faras pri la grandaj atingoj, kiuj lasas spurojn — por reprezenti nian plej altan ĉapitron en la disvolviĝo de nia kongresa dramaturgio.

Inuk montras tempon, kiam tradicia eskima famili-grupo transiras de sia igloa pramondo al nia usoneska socio, kie industriaj ŝablonaĵoj anstataŭas solidajn gentajn realojn. La dramo elmetas, kiel — dum la transirado — malriĉo, mizero, malestimindeco ne permesas al eskimoj taŭge evolui kaj morti, kaj samtempe ne plu ebligas al ili marĉandi sian dekadencan por konvena vivo. Tiuj homoj ne plu kapablas — en etoso de aviadila zumado, turistgregaj mikslingvaj blekadoj, ĉiuspecaj industriaj kiĉaĵoj (galanterio, merceraĵoj, trinkaĵoj, ladrubaj ujoj ktp) . . . — kolporti sian malriĉon kaj eviti sian mizeron. La tuto prezentas torturan, angoran, preskaŭ sufokan historion. La t.n. progreso aperas kvazaŭ enkorpiĝo de ia emo superi pratimon je ŝanĝiĝo, sed la homoj, en la fino, ne scias, ĉu ili progresis, ĉu ili regresis ĝis frenezorando. . .

Tiel la dramo transiĝas en simbolon — obsedan kaj desperan simbolon — kun preskaŭ kosma valoro. Antropologia fono ĉion trapenetas kaj regas. Lasta-scene la eskimoj, senorientiĝintaj, konfuze sin demandas, kien plugvidi sian vivon. La spektantoj bildigas al si, ke fordegeliĝis la tradicia mondkompreno de la eskimoj, kaj ke ĉi tiuj ankoraŭ ne sukcesis simbioziĝi kun la nova "progres"-medio. . . La nesolvita dilemo kuŝas en tio, ke, malgraŭe, la eskimoj tamen volas kaj devas plue vivi!

Eble ĉefe por homoj, kiuj, kiel mi, kanariano, spertas kiamaniere la internacia turisma industrio krude degeneradas lian landan kulturon kaj kiel malespere landidoj migradas al tre foraj latitudoj, ĉar ili intuiacias la senutilecon ekprovi alluton de la nuna kaj antaŭa moraroj — eble tiuj homoj povas pli ĝiskerne kapti la mesaĝon de *Inuk*. Ĉi ties senesperaj kaj lucidaj scenoj, iluminataj de frida lumo projekciata de dolora antropologio, suverene sukcesas konsciigi nin — per siaj aludoj kaj sugestoj — pri nia senhelpeco kontraŭ la nuntempa morŝanĝa brutalato. Sekve, *Inuk* profunde tuŝas nin ĉiujn.

La profesia kvinmembra teamo de la Islanda Nacia Teatro, kiu en perfekta Esperanto, traduke kreita de Stefán Sigurdsson, sub la majstra gvido de Baldur Ragnarsson, prezentis la dramludon, akompanis siajn parolojn per kantoj, hurloj, mimikaĵoj, kiuj meritas plej varmajn aplaŭdojn pro sia vere escepta beleco. Ne mirinde, ke *Inuk* estis totala kaj absoluta sukceso. Mian respektan kordankon al tiuj solecaj, insinuantaj, klaraj islandanoj!

J. Régulo

Pri kelkaj terminoj

TERMINOJ povas influi la koncepton, kiun oni havas pri iu difinita fenomeno. Mistrafa termino aŭ termino uzita en malĝusta kunteksto povas erarigi.

Universala lingvo, komuna lingvo, artefarita lingvo, helplingvo, internacia lingvo, mondlingvo, planlingvo k.a., ili ĉiuj estas terminoj, kiuj substrekas diversajn aspektojn, diversajn flankojn de la sama fenomeno, de internacia komunikilo por diverslingvanoj.

Lastatempe iuj kelkfoje atakis la terminon "planlingvo". Aliaj sin ĝenas nomi Esperanton per ĝia vera nomo, t.e. "Esperanto". Ili preferas paroli pri la "Internacia Lingvo".

Por decidi pri tio, kiu termino por kiu celo pleje konvenas, oni devas konscii pri la tre diversaj ekestoj kaj funkcioj de la terminoj. Ni klopodas prezenti akcepteblan skemon:

Por la celo de interlingvistikaj esploroj oni povas klasifiki lingvojn ĉefe:

A) laŭ ilia genezo

B) laŭ ilia regiona funkcio.

A) **Laŭ la genezo** oni povas klasifiki:

1. **Etnaj lingvoj**, (angle: ethnic languages; germane: Ethnosprachen) t.e. lingvoj, kiuj estas ligitaj al la evoluo de triboj, gentoj, popoloj, nacioj. Oni ĝenerale parolas pri "naciaj" aŭ "popolaj lingvoj".

2. **Planlingvoj**, aŭ **konstruitaj lingvoj** (angle: planned languages, constructed languages).

La termino "planlingvo" (germane: Plansprache) estis unue uzita de E. Wüster¹⁾ en 1931 kaj pli kaj pli disvastiĝas en la interlingvistika literaturo. Temas pri lingvoj (aŭ projektoj), kiuj ne ĉefe spontane evoluas, kiel la etnaj lingvoj, sed estas laŭ certaj modeloj konscie kreitaj aŭ iniciatitaj de la homo. Plej konata estas Esperanto (1887) de L. Zamenhof, kiu fakte sola funkcias kaj sekve — en la plej strikta senco — estas **la sola planlingvo**. Etnaj lingvoj ofte estas nomataj "**naturaj**" lingvoj kaj kontrastigitaj al la planlingvoj, kiuj estas nomataj "**artefaritaj**" lingvoj (artificial language; langue artificielle; künstliche Sprache, Kunstsprache; iskusstvennyj jazyk). "Artefaritaj lingvoj" estas ankaŭ terminologiaj lingvoj de la scienco aŭ formaligitaj simbollingvoj kaj komando- aŭ program-lingvoj por elektronaj instalaĵoj (komputeroj). Konataj estas i.a.

ALGOL, COBOL, FORTRAN. Por tiuj sistemoj la termino "artefarita lingvo" ŝajne estas taŭga, sed ne por Esperanto, ĉar, uzante la nociojn "artefarita" aŭ "natura" lige al etnolingvoj aŭ planlingvoj, "artefarita" ne malofte kun esprimas negativan koncepton kiel "neevolukapabla, senesprima, pala". Kontraŭe, "natura" subkomprenigas la nociojn "esprimova, evolukapabla, kolorriĉa" ktp. Ĉar do la epitetoj "natura/artefarita" estas tiom ligitaj al emociaj sentoj, devenas de biologiismaj konceptoj en lingvoscienco kaj do estas netaŭgaj por sobra scienca diskuto, oni agu jene: a) aŭ oni plene rezignu pri ili b) aŭ plene agnosku, ke en ĉiu lingvo estas konstatebla pli malpli alta grado de konscia influo de la homo, do de "artefariteco", kiel jam antaŭ longe atentigis H. Schuchardt²⁾ kaj O. Jespersen³⁾. Ŝajnas, ke la terminoj "etna lingvo" (aŭ etnolingvo) kaj "planlingvo" tute taŭgas speciale por en scienca diskuto eviti la menciitajn nedeziratajn emociajn kunsignifojn.

B) **Laŭ la regiona funkcio** de lingvoj oni povas i.a. klasifiki ilin jene:

1. **naciaj lingvoj**, kiuj plej ofte ankaŭ estas ŝtatlingvoj, ekzemple la bulgara en Bulgario,

2. **internaciaj lingvoj**, ankaŭ erarige ofte nomataj "**mondlingvoj**". Internaciaj lingvoj povas esti:

a) **etnolingvoj** (ekz. la angla, franca, rusa),

b) **planlingvoj**, kiel Esperanto aŭ duonplanlingvo (semi-planlingvo) Ido. Tiuj planlingvoj ankaŭ ofte estas nomataj "**mondaj helplingvoj**" (auxiliary language; langue auxiliaire; Welthilfssprache; vspomogatelnyj jazyk) aŭ, precipe antaŭ kelkaj jarcentoj, oni parolis pri "**universalaj lingvoj**" (langues universelles), ne ĉiam tute klare distingante, ĉu ili estu dua lingvo, apud la gepatra, aŭ tute anstataŭu ĝin.

La termino "**helplingvo**" denove estas erariga, ĉar ĝi ofte subkomprenigas, ke tiuj lingvoj nur povas ludi helpservojn en la internacia lingva komunikado, do ne samvaloras laŭ tiu vidpunkto kun naciaj lingvoj en la funkcio de internacia lingvo. Tamen "helplingvo" nur volas certigi, ke tiuj lingvoj estu uzataj **apud** la gepatra lingvo, do ne aspiras anstataŭi ĝin en nacia skalo.

Kaj en tiu senco ekzistas situacioj, en kiuj la termino helplingvo povas eviti miskomprenojn.

Iun rolon inter naciaj kaj internaciaj lingvoj ludas la **interpopolaj lingvoj**, kiel en Soveta Unio tiu lingvo estas la rusa etnolingvo funkcia inter la unuopaj sovetaj respublikoj.


2) H. Schuchardt, *Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung*, en: *Almanach der Akademie der Wissenschaften*, Wien, 1904, p.286.

3) O. Jespersen, "Nature and art in language", en: O. Jespersen, *Selected Writings of Otto Jespersen*, London 1962, p.605-724.

1) E. Wüster, *Internationale Sprachnormung in der Technik*, Berlin 1931, p. 353; kp. ankaŭ la reeldonitan E. Wüster, *Konturoj de lingvonormigo en la tekniko*, Aabyhøj, 1975.

3. La termino "**mondolingvo**" estu prefere rezervita por tiu lingvo, kiu, laŭ kelkaj sciencistoj, en fora estonteco evoluos el la diversaj etnolingvoj al la ĝenerala, sola komuna lingvo de la homaro (World-language; Vseobščij jazyk, Weltsprache).⁴⁾

Oni devas substreki, ke la menciitaj terminoj bedaŭrinde tamen estas uzataj tre malunuece, kio rezultigas



Jan Baudouin de Courtenay (1845-1929): Post duona jarcento multaj liaj tezoj kaj studoj ankoraŭ plene aktualas.

diversajn gravajn miskomprenojn kaj malfaciligas la interlingvistikan diskuton.

C) Oni povus mencii ankaŭ, ke ekzistas tria science nepravigebla klasifiko, klasifiko laŭ "**vivanteco**": Sub la influo de la darvinismo, la germana lingvisto A. Schleicher⁵⁾ komparis lingvojn kun biologiaj estaĵoj, kiuj naskiĝas, vivas kaj mortas. Sub lia influo oni do parolis pri:

a) **vivaj lingvoj**, al kiuj kalkuliĝas ĉiuj aktualaj etnaj lingvoj kaj pri

b) **mortaj lingvoj**, al kiuj oni kalkulis la planlingvojn kaj ofte ankaŭ la latinan kaj aliajn malnovajn (antikvajn) ne plu aŭ preskaŭ ne plu funkciantajn etnolingvojn.

Do ekzistas, bedaŭrinde eĉ hodiaŭ en sciencaj diskutoj la serioj "viva → natura → nacia (internacia lingvo) kaj "morta → artefarita → (mond)helplingvo, planlingvo". Ŝajne sufiĉas atentigi ĉi-rilate pri la brilaj studoj de H. Schuchardt⁶⁾ kaj J. Baudouin de Courtenay⁷⁾, kiuj jam antaŭ longa tempo diris ĉion

4) A.T. Bazijev, M.I. Isaev, *Jazyk i nacija*, Moskva, 1973, p.215 sekv.; prefaco de E.A. Bokarev al E. Svadost, *Kak vozniknjet vseobščij jazyk*, Moskva, 1968, p.4.

5) A. Schleicher, *Der Darwinismus und die Sprachwissenschaft*, Weimar, 1873.

6) H. Schuchardt, *Auf Anlass des Volapük*, Berlin, 1888.

7) J. Baudouin de Courtenay, *Zur Kritik der künstlichen Weltsprachen (veranlasst durch die gleichnamige Broschüre von Karl Brugmann und August Leskin)*, Leipzig 1908; kp. ankaŭ la studon de V.P. Grigorjev: "J.A. Baudouin de Courtenay i interlingvistika" en: *J.A. Baudouin de Courtenay (k 30-letiju so dnja smerti)*, Moskva, 1960, p.53-66.

necesan pri tiu temo. La moderna kompreno de lingvo ne lasas spacon por tiaj romantikaj esprimoj kiel "viva" aŭ "morta", ĉar lingvo estas socia fenomeno, instrumento de la komunikado, pensado kaj ekkonado kaj ne biologia estaĵo.

Kiujn terminojn oni do apliku al Esperanto? Esperanto estas **internacia** (laŭ regiona funkcio) **planlingvo** (laŭ ekesto). Krome, estas erare kredi, ke oni povas anstataŭigi la enradikiĝintan nomon "Esperanto" per "La Internacia Lingvo". Unue, kiel ni vidis, ne nur planlingvo povas esti **internacia** lingvo. Due, oni ne forigas emociajn malŝatojn kontraŭ Esperanto, kiujn eble havas iuj sciencistoj pro iuj iam spertitaj sektecaj trajtoj de la Esperanto-movado, per la forigo de tradicia termino. "Esperanto" estas la nomo de difinita lingvo. Ĝin nomi daŭre "La Internacia Lingvo", kio en la germana ekzemple por laiko nenion signifas, nur kreas konfuzon kaj estas tute superflua. Seriozaj esploroj pri la monda lingvoproblemo ĝenerale (interlingvistiko) kaj pri Esperanto speciale (esperantologio) plej bone kontribuas al la prestiĝo de la nocio "Esperanto".

Detlev Blanke

REEĤOJ:

Denove pri vortordo

Laŭ d-ro Verloren van Themaat (*Esperanto*, majo 1977, p. 90), Baghy skribis la frazon **Sanktulinon mi ne vidas / en virina homo** "ĉar li estis hungaro". Ĉu ni do rajtas konkludi, ke Dinwoodie skribis la frazon **Tapiŝon sternis ĝi por la piedo** ĉar li estas skoto, Miyamoto **Kisojn abruptas mi al lipo** ĉar li estas japano, Boulton **Amemajn pardonpetojn eĉ mi diris / mensoge** ĉar ŝi estas anglino, Clark **Kaj ĉian iaman homecon forrabis malsato tirana** ĉar li estis novzelandano, Kurzens **Koron kruele tretu hufa fero** ĉar li estis latvo, ktp? La aserto de d-ro V. v. Th. estas (pardonpete) sensencaĵo. Mi **ne** konsideris la aferon (*Esperanto*, aprilo 1977, p. 64) el vidpunkto okcidenteŭropa, sed el vidpunkto pure esperantista. Ne mi difinis la "konversacian vortordon" sed *Plena gramatiko* (tute prave, cetere). Se d-ro V. v. Th. obstine kredas, malgraŭ monto de kontraŭatestaĵo (el kiu li mem citas *La infanan rason*), ke esperantistaj verkistoj verkas laŭ la stilo de siaj naciaj lingvoj, mi povas nur diri, ke li gravege eraras — kaj perturbas la sciencecon de siaj esploroj. Ĉe mi, ekzemple, okazis la rekta inverso: ne mankis homoj, kiuj atentigis min, ke mia angla stilo akceptis jam tro da esperantismoj.

Kaj **kompreneble** mi konsideris la aferon el literatura vidpunkto. Tio ne povas esti "baza eraro", kiam mia temo estis ĝuste la "efektive uzata" literatura lingvo. Ĉefe la prozon mi traktis, cetere.

W. Auld

Filozofo kaj esperantisto

En aŭgusto pasintjare pasis la 125a datreveno de la naskiĝo, kaj en septembro ĉi-jare la 60a datreveno de la morto de Emile Boirac, ŝlosila figuro el la unuaj jardekoj de la movada historio. Kun ioma malfruo, ni omaĝas tiujn datrevenojn per la sekva fragmento el pli longa studo.

BOIRAC naskiĝis en Guelma (Alĝerio), la 26-an de aŭgusto 1851. En la liceo kaj poste en la literatura fakultato de Bordeaux li studis filozofion kaj beletristikon. Post sukcesplenaj studoj li estis nomita profesoro de filozofio en Saintes. Li poste instruis en Poitiers, Rouen kaj fine en la liceo Condorcet de Parizo.

En 1894 li fariĝis doktoro pri filozofio kaj profesoris en la literatura fakultato de Dijon. Li estis nomita rektoro en Grenoble en 1898 kaj en Dijon kvar jarojn poste.

La unua scienca verko de Boirac estis doktora tezo, *La ideo de la fenomeno*, en kiu li penis akordigi la teoriojn de la du francaj filozofoj Renouvier kaj Fouillée. Poste li verkis lernolibrojn de filozofio, el kiuj *Lecionoj de psikologio aplikata al edukado* estis premiita de la Franca Instituto, kies membro-korespondanto li estis.

Por ni, Boirac estas pli konata kiel pioniro de nia Movado. Por Esperanto lin varbis en 1900 la fama matematikisto Charles Méray. Boirac posedis agrablan voĉon, oratoran talenton, grandan kompetentecon, kaj lia konstante ridetanta vizaĝo kapablis findecidigi la lastajn hezitemulojn. Multaj el liaj prelegoj rezultigis la fondon de loka Esperanto-grupo.


Volante elprovi la lingvon, li pliriĉigis nian literaturon per elstaraj tradukoj de klasikuloj: Sully Prudhomme, J.M. de Heredia, V. Hugo k.a. Li krome tradukis aŭ verkis: *Monadologio* de Leibniz, *Ŝlosileto kvarlingva*, *Perdita kaj retrovita*, *Don Juan* de Molière, la tri-voluman *Plena vortaro Esperanta-Esperanta* k.a.

La plej aktiva periodo de Boirac komenciĝis en 1905, dum la Unua Kongreso en Bulonjo-sur-Mar. Restante ekster la akraj, senĉesaj disputoj de la francaj gvidantoj de la Movado, li estis sukcese proponita de Zamenhof kiel prezidanto de la Kongreso. Tiu saĝa elekto savis la Kongreson de publikaj disputoj; Boirac ankaŭ povis prokrastigi la diskuton pri projekto de Emile Javal pri reformo de la Esperanta alfabeto.

La Kongreso elektis provizoran Lingvan Komitaton (LK), kies prezidanto fariĝis Boirac. Li renkontis sen-nombrajn malfacilaĵojn por funkciigi la lingvan institucion. Por havi la necesan universalecon la LK konsistis el cento da homoj el kiel eble plej multe da landoj

— fakte tio plej gravis, kaj oni ne sufiĉe konsideris la efektivajn kompetentecojn.

Dum la Dua Kongreso en Ĝenevo (1906) la LK fariĝis definitiva; Boirac restis prezidanto. Dum 1907/08 tre grava afero superis ĉiujn aliajn: la Ido-skismo. Tiu krizo tertreme skuis la Esperanto-movadon. La decido de la "Delegacio por alpreno de helpa internacia lingvo" principe aprobinta Esperanton, kondiĉe ke ĝi estu reformita, kio fakte signifis alpreni Idon, estis rifuzita de la plimulto de la LK-anoj. Boirac amariĝis kaj intencis ĉion forlasi. Zamenhof, mem korvundita, argumentis, ke lia foriro estus nova venko de la idistoj. Finfine Boirac restis kaj entreprenis reorganizon de la LK. Zamenhof konsilis kaj sugestis, sed lasis al Boirac la plenan gvidadon de la organiza laboro. Tion ilustras poŝtkarto de Zamenhof al Rollet de l'Isle (poŝt-stampo 1908 01 18): "Kara Sinjoro! La ĉefaj principoj de Via projekto de reorganizo de la Lingva Komitato ŝajnas al mi bonaj. Sed mi ne okupas min pri tiu afero, kiu apartenas tute al la Prezidanto de la Lingva Komitato; tial volu sendi Vian projekton al S-ro rektoro Boirac. Via L. Zamenhof."





**Emile
Boirac
(1851
-1917)**

Iom post iom, pluraj LK-anoj propravole eksigis aŭ estis eksigitaj: de Beaufront, R. Lemaire, Moch, Kofman k.a. En junio 1908 aperis la unua numero de la monata *Oficiala Gazeto Esperantista*, kiu celis represi i.a. la oficialajn tekstojn de la LK. En tiu unua numero troviĝas cirkulero de Boirac pri projekto de interna organizo de la LK. Ĝi antaŭvidis la starigon de "Supera Komisiono aŭ Akademio", kies membronombro ne povos superi 18, por doni pli da efikeco al la lingva institucio. La unuaj elektitaj akademianoj estis : Boirac,

K. Bein (Kabe), Cart, Grabowski, Moch, de Saussure, Nylén, Mybs kaj Villanueva. Poste sekvis: Ellis, Evstifeieff kaj Wackrill.

La konstantaj kvereloj kaj atakoj interne de la Movado, la bruega agitado de la idistoj en universitataj kaj scien-
cistaj medioj tute ne kongruis kun la pacema karaktero de Boirac. Pro la ŝovinisma sinteno de kelkaj superuloj al Esperanto, plurfoje li riskis perdi sian universitatan postenon. Malgraŭ ĉio li senlace daŭrigis la laboron.

La 9a Universala Kongreso en Berno (1913) estis la lasta, kiun ĉeestis Zamenhof kaj Boirac. Milito kaj morto por ĉiam ilin disigis. Dum la milito Boirac ege multe suferis, interalie pro la subita morto de sia edzino, de filo sur la bataalkampo, restado sen novaĵoj de la dua filo, militkuracisto ĉe la rusa fronto. Nur filino restis al li. Kiam, la lastan fojon, li vizitis la Centran Oficejon en Parizo, li diris: "Mi adiaŭas vin, ĉar ni ne plu nin revidos."


Li reiris al la urbeto Salces, ne malproksime de Perpignan, ĉe la hispana landlimo. Tie loĝis lia bofamilio, kaj li kutimis tien veni kiel eble plej ofte. Lia lasta ĝojo estis la vilaĝanaj infanoj de Salces, kiuj kiel kutime bruege lin ĉirkaŭis, sed iun tagon anstataŭ rakonti aŭ ŝerci li diris: "Hodiaŭ mi estas laca. Iru ludi sur la vilaĝa placo. Morgaŭ ni nin revidos." Li kuŝiĝis kaj mortis. Estis la 20a de septembro 1917 je la 21a horo. La senviva korpo estis transportita en Dijon kaj tie enterigita la 6an de oktobro. Charles Lambert, vic-prezidanto de la Universitata Konsilantaro, delegito de la Ministro por Publika Instruado kaj malnova esperantisto, faris la funebran paroladon kaj lastan fojon salutis Emile Boirac, la filozofon kaj esperantiston.

Kunlabore verkis: Marcel Delcourt
Jean Amoureux

Domo por JEI

JAPANA Esperanto-Instituto (JEI), aliĝinta landa asocio de UEA, decidis konstrui novan sidejon en Tokio. Fakte, ne temas pri nur nova ofica spaco por la plej granda japana Esperanto-organizaĵo, sed pri multe pli ambicia projekto — konstruo de "Esperanto-domo" en la japana ĉefurbo.

La nuna sidejo de JEI, malnova duetaĝa domo, jam de longe montriĝas nekonvena. Feliĉe, ĝi troviĝas sur bone vendebla tereno, kion JEI ĵus eluzis, tiel akirante ne nur novan terenon sed ankaŭ krompagon, kiu kovros la bazajn konstrukostojn por la nova kvaretaĝa domo. Rilate la ceterajn elspezojn, JEI nun faras alvokon al la japana kaj eksterlanda esperantistaro por kontribui bonvolajn donacojn. Informojn pri tio bonvolu peti ĉe: JEI, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio 113, Japanio.



La nova "Esperanto-domo" en Tokio finkonstruiĝos meze de la venonta jaro. Ĝi enhavos, interalie, jenajn ejojn: biblioteko, kunvenejo, kursoĉambroj, oficejoj, vendejo, presejo kaj loĝejoj (v. la desegnaĵon).

Universitataj lekcioj

UNUAFOJE en Germana Demokratia Respubliko, universitato akceptis en sian oficialan instruplanon prelegserion pri "Planlingvoj". D-ro Detlev Blanke fariĝis ekde la 1-a de septembro 1977 instrukomisiito ĉe Humboldt-Universitato en Berlino kaj prelegas al 60 studentoj pri la temo "Planlingvoj en teorio kaj praktiko". La studentoj de la germana kaj angla filologioj, inter ili 20 eksterlandaj el Soveta Unio, Pollando, Bulgario kaj Finnlando, aŭskultas serion de entute 15 prelegoj pri la diversaj aspektoj de la monda lingvo-problemo kaj ties solvebloj pere de planlingvo. En la centro de la pritrakto troviĝas Esperanto (fontoj, strukturo, evoluo, komunikadaj potencoj, movado, objekto de lingvoscienco). La prelegaro estas deviga por la studentoj.

Timiga demando

S-ron Lins timigas la demando, ĉu Esperanto estas servopreta (*Esperanto*, junio 1977, p. 104). Ne, Esperanto neniam povas esti tute preta por sciencistaj kaj teknikistaj celoj, ĝis tiuj specialistoj mem komencos uzi ĝin. Atentinde tamen estas, ke por komuniki fakajn ideojn oni bezonas du specojn de vortoj: multajn komunuzajn kaj kelkajn specialajn, kiel rizo kaj korintaj vinberoj. Ankaŭ naciaj lingvoj prunteprenas specialajn terminojn, ĉar eĉ mezgrandaj kulturaj lingvoj ne havas pretan faklingvon por ĉiu specialista bezono. Ni nun devas pensi pri adaptoperiodoj, dum kiuj Esperanto estos praktike uzata kun naciaj lingvoj. La oficialigo de Esperanto supozeble ne komenciĝos per tio, ke la tuta mondo subite eklernos ĝin. Paŝon post paŝo.

R. Vetter, Nederlando

Kial ĉiam aparte?

En la n-ro de aprilo 1977 (p. 69), Karolo Piĉ pledas por 112-paĝa revuo. Mi emas konsenti kun Piĉ. Eble tio povus helpi komencantojn por kiuj R. Stone pledas sur la sama paĝo.

Lastatempe venas amaso da bultenoj, sufiĉe mizeraspektaj sed tamen enhavantaj kelkajn bonaĵojn. Unu el ili estas la bulteno de Pacifika Asocio por Instruistoj de Esperanto. Kial aparta bulteno? *Internacia pedagogia revuo* estas ja bonaspekta periodaĵo. Sed, kial ne sufiĉus pedagogia rubriko en la revuo *Esperanto*? Simile estas ankaŭ kun scienco, medicino, literaturo ktp. Mi kredas, ke esperantistoj kontribuos al fondaĵo por tia projekto de impona revuo, kiun ni povus kun fiero montri ankaŭ al skeptika publiko.

Cathy Schulze, Usono

Kiel bona terkulturisto

S-ro N. Kavenius (*Esperanto* n-ro 856) demandas, ĉu inter la legantoj de ĉi tiu revuo troviĝus iu, kiu povus kompili statistikon pri la universitatoj, en kiuj oni lernadas Esperanton. Mi opinias, ke tion povas fari nur UEA, kune kun TEJO. Sed ĉi tio ne elĉerpas la problemon. Estus bone, ke ĉiu landa E-asocio havu listigitaj lerneajn kursojn en la propra tereno. Bona terkulturisto scias kaj atente observas la plantojn, kiuj kreskas sur lia terpeco, ĉar de ili dependas lia prospero.

W. Majchert, Pollando

Kolektanto de monbiletoj

Meze de la pasinta jaro, mi ricevis strangan leteron de sinjorino el Ĉeĥoslovakio. Ŝi skribis ke, laŭ ŝia juĝo, Nederlando estas preskaŭ la lasta lando en la mondo, kie ankoraŭ vivas fidelaj kristanoj. Kaj el tiuj bonaj kredantoj — kia grandega honoro! — ŝi elektis ĝuste min, ĉar ŝi trovis miajn nomon kaj adreson en la **Jarlibro de UEA**. Tiu grava eldonaĵo lernigis al ŝi, ke mi

estas delegito pri religiaj kaj sociaj aferoj. Post longa neinteresa enkonduko, turniĝanta ĉirkaŭ la temo "religio", ŝi petis, ke mi monigu la enmetitajn poŝtmarkojn kaj transpagu la egalvaloron (10 guldenojn) al banko en ... Svislando. Ŝi nome sciigis, ke ŝi **kolektas monbiletojn** (ĉu ne "ŝatokupo" de la pli granda parto de la homoj?).

Ĉar mi opiniis tiun peton misuzo kaj de religio kaj de la delegita reto de UEA, mi decidis entute ne respondi. Tio verŝajne ja estas la plej taŭga respondo kaj la plej efika rimedo por malinstrui al tiaj, Esperanton kaj konvinkon misuzantaj, homoj tro strangan konduton kaj ruztendencan agmanieron. Mi jam estas pikita per tio, ke la koncerna — malĝuste adresita — letero estis registrita, tiel ke mi devis vojaĝi al la poŝtoŭficejo, kie oni postulis eĉ krompagon ĉe la transdono! Tien veturi, la sinjorino dufoje devigis min, ĉar iom poste ŝi sendis admonan leteron denove registritan. Post tio, ŝi ĉie kaj ĉiel mobilizas aliajn delegitojn por skribi al mi, ke mi estas malbonkondata samideano. (Nu, ŝiaj ideoj ĉi-rilate nepre ne estas la miaj: Oni **antaŭe** petu, nenion altrudante, kaj **poste**, konforme al la respondo, agu! Tio ŝajnas al mi bona konduto).

Longe mi hezitis laŭ ĉi tiu malagrabla vojo klarigi al ĉiu, ke mi **ne** estas delegito pri bankaj kaj financaj aferoj. Cetere, kiu repagas al mi la kostojn, kiujn mi ĝis nun havis? Ili jam superas la sumon de la nepetitaj poŝtmarkoj iam senditaj.

J.A. Tuinder, Henegouwenlaan 35,
Heemskerk 1600, Nederlando

Pri la jubilea revunumero

Dankon pro la interesa numero de la revuo *Esperanto* 7-8/1977, kiu modele festis la 90-jaran jubileon. Eble la plej plaĉa artikolo estis tiu de Claude Piron "La okcidenta dialekto", kiu same kiel la artikolo de s-ino Woessink-Nagata "Eŭropaj kutimoj kaj la tutmondigo de Esperanto" en la n-ro 5/76 prezentis la vidpunkton de tiuj, kiuj ne denaske parolas hind-eŭropan lingvon. Dankon ankaŭ al la aliaj kontribuantoj, antaŭ ĉio al Gaston Waringhien, Marjorie Boulton kaj William Auld.

T. Tyynelä, Finnlando

Evitu esperantigi nomojn

Ŝajnas, ke ankoraŭ ekzistas kelkaj nekuraceblaj fanatikuloj, kiuj volus "esperantigi" ĉiujn latin-literajn nomojn de personoj kaj urboj. (v. *Esperanto* 856, p. 69). Necesas insiste atentigi pri jeno:

1) Neniu rajtas kaprice modifi personajn nomojn, kies ortografio figuras sur ĉiaspekaj oficialaj dokumentoj, ekz. naskiĝatestoj, identecokartoj, pasportoj k.a. Do, ekzemple, anstataŭ *Rousseau* (pron.: russo) oni ne skribu *Ruso* ktp.

2) La Konferenco de la UN-komisiono por normigo de geografiaj nomoj decidis en Genève, en septembro 1976: "Nur la nacilingva skribmaniero de latinliteraj urbonomoj estu uzata." Do, ni ne skribu *Blezo* anst. *Blois* (pr: blŭa), aŭ *Lepsiko* anst. *Leipzig* (pr: lajpcig)

ktp, se ni volas eviti mokridojn de la publiko ekster
nia Movado!
Bernard Thaillet, Francio

REDAKCIA NOTO: Esperanto celas esti la dua lingvo, sed ĝi ne estu duaranga lingvo. Kial oni en Esperanto ne rajtus fari la samon, kion faras ekz. la gepatra lingvo de s-ro Thaillet, kie oni diras *Vienne* por *Wien*, *London* por *London*, *La Haye* por *Den Haag*, *Copenhagen* por *København*, *Cologne* por *Köln*, *Varsovie* por *Warszawa*. Kial do ne en Esperanto: Vieno, Londono, Hago, Kopenhago, Kolonjo, Varsovio? Oni do ja esperantigu la nomojn de internacia signifo, sed oni ne troigu kaj ne klopodu al la internacia komunumo instrui la nomojn de vilaĝoj, kiuj ankaŭ por la plimulto de samlandanoj restas nekonataj. S-ro Thaillet pravas pri la personaj familiaj nomoj, kvankam la homoj, kiuj neniam lernis la francan, neniel povas konjekti, ke Thaillet prononciĝas proksimume kiel "taje".

Mediterranea entuziasmo

Finleginte la artikolon "La okcidenta dialekto" en la julia-aŭgusta numero, mi estis kaptita de neeltenebla, tipe mediterranea, entuziasmo. Nu, mi pensis ke finfine malkreskis herbo en via cerbo kaj ke vi sukcesis aperigi la plej bonan prilingvan artikolon, kiun mi iam ajn legis en tiu ĉi revuo.

R. Corsetti, Italio

Malfacile estus kompreni

Boulton recenzas *Hebreo el la geto* (*Esperanto*, majo 1977, p. 91), dirante "la ciferojn en studaĵo pri rusa-internacia vortaro almenaŭ mi vere ne sukcesis post sincera penado kompreni". Se ni ne povus serĉi la rusajn vortojn per helpo de la ciferoj 61, 118, malfacile estus kompreni la signifojn de **landaĵo**, **unukortulo** (ruse: *zemstvo*, *odnodvorec*).

Naokazu Kawasaki, Japanio

Recenzoj

Utila arsenalo de citaĵoj

Recenzas William Solzbacher (Usono):

Pri internacia lingvo dum jarcentoj (1970), de Isaj Dratwer. Tel-Avivo: La aŭtoro, 1977 (2a eld.). 16+320p. 22cm.

Riĉenhava verko, utila al ĉiu, kiu deziras informi la publikon pri Esperanto, nun ekzistas en dua eldono multe pli ampleksa ol la unua, aperinta en 1970. Kelkajn el la citaĵoj, argumentoj kaj faktoj, kiujn ĝi prezentas, mi mem ofte uzis en paroladoj kaj artikoloj. Aliajn mi trovas unuafoje. La kompilinto (sur la foto) meritas grandan laŭdon pro la lerteco, diligenteco kaj persisto, kun kiuj li amasigis tiom da valora materialo el centoj da fontoj plej diversaj. Plaĉas al mi, ke kelkaj bone konataj citaĵoj aperas en iom pli vasta kunteksto. Tio faras ilin pli bone uzeblaj. La libro enhavas ankaŭ eldirojn de famaj personoj pri internacia lingvo ĝenerale kaj kritikajn prijuĝojn de Esperanto. De la principa vidpunkto mi trovas tion tre bona, sed de la praktika vidpunkto leviĝas problemoj, ĉar kelkaj el tiuj citaĵoj bezonus pli detalajn klarigojn.

Prezeraroj ĝenerale ne estas multnombraj, sed en tia libro oni devus esti speciale singardema pri nomoj, titoloj kaj nombroj. Hunphrey Tonkin kaj Marc



Starr (p.309), Eleonore Franklin D. Roosevelt (p.258) kaj A. Parkinson (**Oxon**) . . . (p.274) estas ekzemploj de tio, kion oni devus eviti. Parolante pri "Walter Scheel . . . Ministro pri Eksteraj Aferoj," oni devus diri, ke li nun estas prezidanto de la Germana Federacia Respubliko (p.227), kaj "Senatano" Tunney nun estas eks-senatano (p.242). Kelkaj informoj en la libro ŝajnas al mi dubaj aŭ troigitaj, ekz. la diro, ke Clara Barton, fondintino de la Usona Ruĝa Kruco (p.257) kaj Nobelpremiulo Salvatore Quasimodo (p.100) "estis Esperantistoj".

Traduko de la UNESCO-Rezolucio de 1954 (p.288) diras, ke la Ĝenerala Konferenco . . . **komisias** la Ĝeneralan Direktoron . . . sekvi la uzadon de Esperanto. Dum multaj jaroj la UEA-Jarlibro uzis la vorton **instrukcias**. Ĝusta traduko estas **rajtigas**, ĉar la originala teksto diras **autorise** en la franca, **authorizes** en la angla lingvo. Mian kritikon de la mistraduko d-ro Lapenna respondis per du argumentoj: (1) ke UNESCO-rezolucioj uzas la vorton **rajtigas** en la senco de **instrukcias** (eble jes, sed tio ne ŝanĝas la fakton, ke la Esperanto-traduko uzas multe pli fortan esprimon ol la originaloj), (2) ke la originala teksto estis en Esperanto (tamen tiun Esperanto-tekston neniam vidis la delegitoj, kiuj voĉdonis en la Ĝenerala Konferenco).

En sufiĉe multaj kazoj s-ro Dratwer uzas nerektan fonton. Eldiro de Albert Einstein (p.118), "Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de internacia lingvo," estas atribuita al *Germana Esperanto-revuo*, sed nenio indikas, kiam, kie aŭ al kiu Einstein diris aŭ skribis tion. Proksimume en 1950 mi sendis Esperanto-materialon al profesoro Einstein, dirante en akompana letero, ke mi esperas, ke la dokumentoj interesas lin, ĉar li ja esprimis favoron al la lingvo, fariĝante Honora

Prezidanto de la SAT-Kongreso en Kassel en 1923. Li respondis al mi, ke li ne favoras kaj neniam favoris Esperanton. Trarigardante librojn pri Einstein, mi trovas nur unu mencion de Esperanto: en Svisujo, en 1889, la juna Einstein estis amiko de Max Talmey, kiu poste fariĝis propagandisto por Esperanto kaj fine por Ido kaj Ilo. Sen aldonaj informoj mi ne mencias la nomon de Einstein en informa laboro pri Esperanto — sed mi ankaŭ ne nomus lin "hebrea fizikisto", kiel faras Dratwer.

Tia verko nepre necesa por la Esperanto-movado ne povas esti perfekta aŭ kompleta. Oni tamen povas esperi, ke aperos multaj pluaj eldonoj ĝisdatigitaj, ĉiu pli bona ol la antaŭaj.

Prezo: 30,00 (por Nederlando 31,20) gld., plus sendokostoj 10%.

Per dialoga sprito

Recenzas Charles R.L. Power (Nederlando):

Jen nia mondo, de J.C. Wells k.a. London: Group Five, 1974. 2+56p. Ilus. 21cm. Kun sep kasetoj po 15 min.

Siatempe, la dek ses reguloj estis inter la plej potencaj varbiloj por la Internacia Lingvo. Por homo, kiu jam lernis plurajn lingvojn kaj komprenas elementajn gramatikajn terminojn, ili bele montras la relativan simplecon de Esperanto. Sed alian metodon oni bezonas por la nuntempa juna anglalingvano, kiu ofte havas apenaŭ scion pri eĉ la propralingva gramatiko. Unu tian metodon uzas la por radio kreita kurso *Jen nia mondo*, kiu abunde amuzas kaj avare penigas la lernanton.

Unuflanke, la kurso tiel donas iom mankan bildon de la lingvo, evitante la nekutimajn kunmetitajn vortojn, per kiuj William Auld streĉas la cerbon en sia lernolibro *A first course in Esperanto*. Mankas ankaŭ pluraj parolformoj nekonataj en la angla sed tre gravaj en Esperanto, kiel ekz. "tiel . . . kiel" kaj "por ke (oni) . . . -u".

Aliflanke, la dialogoj (inter du modernaj gejunuloj, Petro kaj Helena) estas eble la plej spritaj troveblaj en lernolibro de Esperanto. En unu, Petro motivigas al Helena sian deziron por rapida geedziĝo per la kongreskotiza avantaĝo!

Resume, la kurso ne estas — nek, cetere, pretendas esti — plena prezento de la lingvo, sed ĝi ja estas entuziasmiga enkonduko al pli elĉerpa kurso.

Rilate prononcon, la kurso estas tre bona. La angleca akcento de Irene Schilperoord (Helena) ne vere ĝenas, kaj la akcento de Karlo Bartošik en la rolo de Petro estas modele internacia. La enkondukon (eventuale uzindan kiel apartan radian prelegon pri Esperanto) kaj la ekzercojn parolas la konata fonetikisto kaj leksikologo John C. Wells. Neanglaj anglalingvanoj nur zorgu atenti, ne la tekstajn prononckonsilojn, sed nur

la sonbendon. Al usona lernanto estus tre malprudente konsili, ke "objekto" prononciĝas kvazaŭ "awb-yek-taw".

Prezo: 93,00 (por Nederlando 109,74) gld. por la kompleto; 5,10 (por Nederlando 5,30) gld. por la libro; aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Ĉarme, sed manke

Recenzas Alec Venture (Britio):

Malnovaj rakontoj en Takatuki, de Syûho Utuki. El la japana tradukis la eldoninto. Takatuki (Japanio): Esperanto-Societo, 1976. 100p. Ilus. 18cm.

Jen kolekto de dudek ses simplaj folkloraj rakontoj farita de Syûho Utuki, kaj eldonita okaze de la dek-jara jubileo de la Esperanto-Societo de Takatuki. La verketo enhavas ilustraĵojn de Syôzi Oonisi kaj glosaron. La rakontoj estas ĉarmaj. Multaj el ili temas pri bestoj, sed aliaj pri naivaj vilaĝanoj. Por okcidenta leganto ili ĵetas interesan lumon sur la pensmanieron de japanaj kamparanoj. Kvankam la lingvaĵo estas facile komprenebla, estas bedaŭrinde, ke ĝi ne estis pli severe redaktita, ĉar troviĝas tro da iom elementaj eraroj.

Prezo: 5,40 (por Nederlando 5,62) gld., plus sendokostoj 10%.



DU NOVAJ LIBROJ DE TK/STAFETO

LA TROFEOJ, poemaro de la franca sonetmajstro kaj akademiano José Maria de Hérédia (1842-1905). Traduko kaj antaŭparolo de Gaston Waringhien. 220p. 21cm. 12,00 (por Nederlando 12,48) gld.

LA NEKONATA KONATO, originala romano de Douglas P. Boatman (1892-), unue eldonita de *Heroldo* en 1928. 120p. 19cm. Prezo: 6,60 (por Nederlando 6,86) gld. En *Bibliografia gazeto* 4/1933, Kalocsay skribis jene pri ĉi tiu romano: "...ventfrape rapida, glata, agraba, rutina, facila stilo."

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Laste aperis...

Al vi de mi *, Alberta Casey. La Jolla: Berta Records, 1977. Duflanka, stereofona disko. 33 t/m. 30cm. FM 77031. 17 popularaj kantoj de diversaj aŭtoroj kaj tradukintoj. Piane akompanas Edith Gordon. Prezo: 18,00 gld.

Antropogenezo; Studo pri la ekesto de la homo (1947), A. Pannekoek (1873-1960). El la nederlanda trad. R. Leereveld. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978 (fakte 1977). 88p. Mimeo. 21cm. Prezo: 3,60 gld.

De tempo al tempo, Giorgio Silfer (pseŭd.). Kuopio/Milano: Literatura Foiro, 1977. 87p. 24cm. Poemoj verkitaj en la jaroj 1971-3, inter kiuj kelkaj en la lingvoj itala kaj angla. Prezo: 11,70 gld.

Deutsches Esperanto-Institut; Aufbau, Entwicklung, Leistungen, W. Bormann, U. Lins, A. Burkhardt kaj G. Tucker. Augsburg: Deutsches Esperanto-Institut, 1977. 56p. Ilus. 21cm. Priskribo de la starigo (1908), evoluo kaj atingoj de Germana Esperanto-Instituto. Prezo: 4,50 gld.

Dua lingvo, La; Esperanto-persa lerno-libro, M.H. Saheb-Zamani. Tehran: The Atai Press, 1976. 219p. 22cm. Prezo: 3,50 gld.

El la vivo, Vesna Skaljer-Race (1911-). Beograd: La aŭtoro, 1977. 67p. 16cm. Kolekto de noveloj kaj skizoj, originale verkitaj en Esperanto. Prezo: 9,84 gld.

Esperanto-persa vortareto, S.M. Gaem-Magami kaj J. A. Sadigi-Saheb-Zamani. Tehran: The Atai Press, 1977. 22p. 22cm. Prezo: 1,00 gld.

Eternan gloron al la granda gvidanto kaj instruisto prezidanto Maŭ Zedong. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 2+38p. 22cm. Prezo: 0,90 gld.

Eŭropa kalendaro. Redaktis kaj ilustris Brigitte Frank-Böhringer. Paderborn: Eŭropa Klubo, 1977. 18 folioj. 29cm. Ĉe ĉiu dato de la lasta parto de 1977 (1977.08.29-1978.01.01) staras vorto grandlitere en Esperanto, diklitere en la latina, kaj flanke en la germana, angla, itala, franca, nederlanda, dana kaj irlanda lingvoj, kun ilustra desegnaĵo. En samaj lingvoj aperas nomoj de monatoj kaj semajntagoj. Devizo de la kalendaro estas "La Eŭropa Unio estas kaj restas plurlingva. Necesas lerni fremdajn lingvojn!" Prezo: 5,40 gld.

Fondita sur roko; La filozofio de Spinoza post tri jarcentoj, Albert Goodheir. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1977. 12+37p. Mimeo. 21cm. ISBN 0 905149 04 1. Studo pri la idearo de la nederlandjuda filozofo (1632-1677). Prezo: 6,60 gld.

Granda historia venko; Varme celebri la posteniĝon de prezidanto Hua Guofeng kiel gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la frakason de Vang-Gang-Giang-Jaŭ-a kontraŭpartia klico. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 50p. 18cm. Prezo: 0,90 gld.

Hamburgo en retrospektivo (1975), Ivo Lapenna (1909-). Kopenhago: Eldonejo "Horizonto", 1977 (2a kompletiga eld.). 11+151p. 21cm. Prezo: 21,00 gld.

Inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha, La, Miguel de Cervantes Saavedra (1547-1616). El la hispana tradukis Fernando de Diego. Zaragoza: Fundación de Esperanto, 1977. 820p. Gravuraĵoj de G. Doré. 25cm. Bindita. ISBN 84 400 3582 9. Ĉefverko, eble la plej bona romano de la monda literaturo, en traduko, kiu estas la ĉefverko de la tradukinto. Prezo: 62,70 gld.

Kantas Miŝo Zdravev*. Sofia: Balkanton, 1976 (ne indikita). Duflanka, stereofona. 18cm. 45 t/m. 8min. BTK 3313. "La unua tago de la printempo", "Mia gitaro". Prezo: 4,50 gld.

Katalogo de la planlingva literaturo de la universitata biblioteko Saarbrücken / Katalog der Plansprachenliteratur der Universitätsbibliothek Saarbrücken, Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Saarländische Esperanto-Bund, 1977. 50p. 20cm. Prezo: 10,50 gld.

Konsolanto, La (1940), Francisco Cândido Xavier (1910-). El la portugala trad. Benedicto Silva. Rio: Federação Espírita Brasileira, 1977. 190p. 18cm. 411 demandoj kaj respondoj, sisteme aranĝitaj, pri la spiritisma doktrino. Diktis la spirito Emmanuel. Prezo: 6,90 gld.

Kristnaskaj kantoj. Kantas membroj de la ensemblo Muzilanoj en Tarnowie Córy. Polskie Nagrania. Disko 16,5cm., 45 t/m, duflanka, stereofona. Z-SN-0557. Kun notoj pri la muzikskriba sistemo Muzilo kaj la teksto de la kantoj sur la kovrilo. Prezo: 9,00 gld.

Kvaropo (1952), W. Auld (1924-), J.S. Dinwoodie (1904-), J. Francis (1924-) kaj R. Rossetti (1909-). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1977 (2a eld.). 256p. 19cm. ISBN 963 571 002 X. Volumo per kiu establiĝis la t.n. "skota skolo". Aŭtentika mejloŝtono de la Esperanta poezio. Kun ampleksa kritika postparolo de Vilmos Benczik. Prezo: 19,80 gld.

Liu Venhŭe. Trad. el la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 48p. (nenumeritaj). Kolorilus. 18cm. Pri 14-jarulo kiu mortis dum provo denunci klasan malamikon. Prezo: 1,20 gld.

Malnovaj rakontoj en Takatuki, Syŭho Utuki. Takatuki: Esperanto-Societo, 1976. 100p. Ilus. 18cm. 26 folkloraĵoj, inkluzive historietojn pri Gonbe. Prezo: 5,40 gld.

Pentraĵoj de ĉinaj infanoj. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 74p. (nenumeritaj). Ilus. 20cm. Koloraj pentraĵoj diversstilaj de 4- ĝis 15-jaraj infanoj. Prezo: 1,80 gld.

Planlingvaj problemoj; Esperanto kaj la naturalismo (1962), William Gilbert. Kopenhago: TK, 1977 (2a eld., ofsete). 99p. 19cm. Beletraj Kajeroj de Stafeto n-ro 12. ISBN 87 87089 12 2. Baza verko de la kompara interlingvistiko, verkita de iama "senatano de la Occidental-union", kiu konvinkigis pri la supereco de Esperanto. Prezo: 10,50 gld.

Pri la Esperanta literaturo, R. Laval (1900-). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1978 (fakte 1977). 17p. Mimeo. 21cm. Studo verkita de la sekretario de la Literatura Komitato de SAT. Prezo: 0,90 gld.

Probablokalkulo; Elementa enkonduko, O. Reiersøl. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj, 1976. 80p. 30cm. SUK-Kursotekstoj KT 21. Prezo: 15,90 gld.

Projekto de internacia aboco por nomoj kaj fremdvortoj, Josef Hartl. Vieno: La aŭtoro, 1977. 28p. 20cm. Internacia diskutejo 2. Prezo: 8,10 gld.

Projekto de senriproĉa monda monsisistemo kun valorstabila ŝparmono, Josef Hartl. Vieno: La aŭtoro, 1976. 16p. 20cm. Internacia diskutejo 1. Prezo: 6,75 gld.

Projekto de tuja forigo kaj evito de inflacio, Jozef Hartl. Viin (Wien): La aŭtoro, 1977. 27p. 20cm. Internacia diskutejo 3. Prezo: 8,10 gld.

Renesanca periodo, La. Enkondukoj, notoj kaj tradukoj el la franca de Gaston Waringhien (1901-). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1977. 207p. 20cm. Plejado 4. Dulingva kolekto de francaj poemoj de la 16a jarcento, precipe de Joakimo Belajo (1522-1560) kaj P. de Ronsardo (1524-1585). Prezo: 21,00 gld.

Riverdefenda skemo. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1977. 82p. (nenumeritaj). Ilustris Ŝi Joŭfu kaj Vu Gin'ju. 17cm. Bildrakonto kompilita laŭ revolucia rakonto "Rivera torento". Prezo: 0,90 gld.

Rozinjo, Gyula Török (1888-1919). El la hungara tradukis (1938) K. Kalocsay (1891-1976). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1977 (fotorepreso). 39p. 19cm. Prezo: 6,60 gld.

Sekai o hitotu no kotoba de, Noboru Asahiga (1929-). Tokio: Kokudosya, 1976. 268p. Ilus. 19cm. "Ligi la mondon per unu lingvo", japanlingva biografio de Zamenhof, verkita speciale por mezlernejanoj. Prezo: 980 enoj.

Tra l'mondo. Kantas Olivier Tzaut. Tradukis C. Piron. Muzika gvido de R. Siedel. La Chaux-de-Fonds: O. Tzaut, 1977. 33 t/m. Stereofona. 30cm. OT 1935. Dekdu popularaj kantoj diverslandaj. Luksa duobla kovrilo kun ĉiuj kantotekstoj en Esperanto kaj la franca. Haveblas ankaŭ samenhava kaj sampreza sonkaseto. Prezo: 28,80 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,- gld.

34a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO

1978 07 22 – 07 29, Veliko Tarnovo, Bulgario

TEJO en Tarnovo

LA 34a INTERNACIA Junulara Kongreso de TEJO okazos en unu el la plej pitoreskaj kaj arkeologie fascinaj urboj de Bulgario, la deklivoplena Veliko Tarnovo, kiu originis kiel mezepoka fortikaĵo kaj estis iam la ĉefurbo de Bulgario. La Alta Protektanto de la 34a IJK estos s-ino Ljudmila Ĵivkova, ministro pri kulturo de Bulgario.

La ĉeftemo de la Kongreso en Veliko Tarnovo estos "Esperanto kaj interjunulara amikeco". La Loka Kongresa Komitato, kiu – simile al tiu de la 63a UK – estas pli "landa" ol "loka", jam transdonis al presejo la unuan bultenon de la 34a IJK. En tiu eldonaĵo troviĝos ĉiuj necesaj aliĝinstrukcioj, kotiztabelo kaj aliaj utilaj informoj. Ĉar la aliĝtarifo momente estas la plej necesa informo por la estontaj kongresanoj, ni resumas ĝin ĉi tie:

Ĝis la fino de februaro 1978, oni pagas 157,00 guldenojn, se aliĝinto estas ne pli ol 20-jara; 177,00 gld. (por ne pli ol 25-jaraj); 197,00 gld. (ĝis inkluzive 32-jaraj); 222,00 gld. (por pli ol 32-jaraj aliĝantoj). Kiel kutime, individuaj membroj de UEA/TEJO ĝuas rabaton de 10 guldenoj. La aliĝkotizoj, kompreneble, kovras ankaŭ la kostojn de restado kaj manĝoj. En la unua bulteno aperos ankaŭ kotiztabelo en bulgaraj levoj, kiu koncernas kongresanojn el orient-eŭropaj landoj. La adreso de LKK estas: Poŝtkesto 587, BG-1000 Sofia C, Bulgario.

RAPORTO PRI LA LANDAJ SEKCIOJ:

Kiom grandas TEJO?

"ĈI TIU RAPORTO prezentas la plej fundan enketon pri la aktuala stato de la junulara Esperanto-movado, kiun TEJO entreprenis en la lastaj jaroj, kaj eble eĉ dum sia tuta ekzisto". Jen la unuaj vortoj de la enkonduko de 36-paĝa raporto pri la landaj sekcioj de TEJO, kiu aperis en julio 1977 en 120 ekzempleroj. Ricevis ĝin ĉiuj komitatanoj kaj landaj sekcioj de TEJO, estraranoj de UEA kaj aliaj aktivuloj. Ĝi prezentas sub dektri konsekvence uzitaj subtitoloj informojn pri 18 el la 30 landaj sekcioj de TEJO. La fakto, ke 12 sekcioj ne reagis al la 6-paĝa enketilo, kiu provizis la materialon por la raporto, estas unu el pluraj signoj, ke ankoraŭ necesas multa laboro por atingi la celon, al kiu ĉi tiu raporto estas la unua paŝo,

nome: reguligi la kolektadon, kompiladon kaj redistribuon de informoj, tiel ke estu konstante havebla detala kaj utila superrigardo pri la aktuala stato de la landaj sekcioj de TEJO.

Montriĝis, ke 14 el la 18 reagintaj grupoj estas junularaj sekcioj de landaj asocioj de UEA, dum nur 4 estas memstaraj. La raporto malkovris membro- kaj kotiz-sistemojn plej diversajn, ne rekte kompareblajn unu kun la alia. Tamen, enkalkulante nur la membrojn malpli ol 25-jarajn, tiuj sekcioj havas sume ĉ. 9000 membrojn.

En la raporto listiĝis informoj pri la fondoĵaro, gvid-organoj, eldonaĵoj kaj agado de la sekcioj. Ĉiu grupo havis la eblecon taksi la plej sukcesajn kaj la plej nekontentigajn aspektojn de siaj laboroj kaj esprimi opiniojn pri la diversaj servoj, kiujn provizas TEJO. Krome, aperis Esperantaj tradukoj de nacilingvaj varbiloj pretigitaj de du sekcioj kaj priskribo de vidbendaj laboroj en tria. Raportofine troviĝas komentoj pri la situacio en nereagintaj landoj, agad-rekomendoj, jarraporto de la koncerna estrara fako por la pasinta kaj laborplano por la venonta jaroj.

La raporto atentigis pri kelkaj sekcioj, kiuj refortiĝas, kaj aliaj, kiuj funkcias pli bone ol iam antaŭe. Ĝi tamen malkovris ankaŭ evidentajn mankojn. Unue, la neceso pli bone nombri la membrojn de TEJO, pri kio landaj asocioj ĵus ricevis peton. Due, la magra ekstereŭropa reago (nur tri el 18) signalas la bezonon por pli aktiva Regiona Agado precipe en Latinameriko. Oni intertempe nomis apartan TEJO-estraranon por prizorgi tiun kontinenton, kaj li jam petis reagojn de la nerespondintaj landaj sekcioj kaj korespondas kun BEJO, la sekcio en Brazilo, kiu volas kunlabori. Por helpi en tio, la TEJO-estrarano kompilis raporton de ĉiuj nun sciataj informoj kaj kontaktadreso, kaj sendis ĝin al ĉ. 40 grupoj, gazetoj kaj junuloj en latinameriko, petante samtempe pli da informoj.

Israela vojaĝo

ISRAELA GRUPO de 13 gejunuloj faris en julio kaj aŭgusto ĉi-jare vojaĝon tra Eŭropo. La grupo, aranĝita de JELI (Junulara Esperanto-Ligo Israela) estis invitita de Germana Esperanto-Junularo por rondvojaĝo en FR Germanio kaj vizito de lokaj E-grupoj tie.

Dum la vizito la grupo estis akceptita ĉe tri urbestroj, aperis artikoloj kaj intervjuoj en almenaŭ 7 gazetoj, kaj la propaganda efekto en kaj ekster la Movado en Germanio estis granda. Indas menci, ke la grupo estis oficiale rekonita en la kadro de la junulara interŝanĝo israela-germana kaj ricevis ŝtatajn subvenciojn, tiel de FR Germanio, kiel de Israelo.

Post la restado en FR Germanio, la grupo vizitis la kulturdomon Grésillon (Francio) kaj partoprenis la 33an IJK en Poitiers. La tuta vojaĝo estis unika travivaĵo por la gejunuloj, el kiuj granda parto estis freŝaj esperantistoj. Nun oni preparas en Israelo la akcepton de grupo de Germana Esperanto-Junularo en la venonta jaro.

Amri Wandel

**63a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Varno (Bulgario)
1978 07 29 – 08 05**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Bul.
Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Bulgario.**

Protektos unua vicprezidanto de Ŝtata Konsilantaro

S-ro Petr Tanĉev, unua vicprezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de Bulgario, fariĝis Alta Protektanto de la 63a Universala Kongreso de Esperanto.

Aŭtoro de "Bofilino" en Honora Komitato

En la vico de la nuntempaj bulgaraj verkistoj, la unuan lokon okupas Georgi Karaslavov, kies fama romano *Bofilino* (1942) aperis en Esperanto en 1959. S-ro Karaslavov, membro de la Bulgara Akademio, estos membro de la Honora Komitato de la 63a UK. Ceteraj membroj de la Honora Komitato estos: Angel Balevski, (prezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj), Marij Ivanov (unua vicministro pri eksteraj aferoj), akademiano Kiril Bratanov (prezidanto de la Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario), Atanas Dimitrov (prezidanto de la Komitato por Turismo), akademiano Pantalej Zarev (prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj), akademiano Petr Dinekov, Stanoj Janev (prezidanto de la Urba Konsilantaro de Varno), prof. Vasil Peevski (membro de la Honora Patrona Komitato de UEA), prof. Georgi Dimitrov (rektoro de la Instituto de Popola Mastrumo en Varno), patriarko

Maksim de la Bulgara Ortodoksa Eklezio kaj Ĥristo Radevski (poeto kaj parlamentano).

Peevski triafoje rektoro de ISU

Prof. Vasil Peevski, prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Geodeziistoj, prezidanto de la sciencista sekcio de la Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario kaj redaktoro de la Esperanta eldono de *Scienca Mondo*, organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, estos rektoro de la 31a sesio de Internacia Somera Universitato. Prof. Peevski fariĝos la dua homo en la historio de ISU kun trifoja rektoreco (antaŭe ĉe la 48a kaj la 61a UK). La rekordon tenas prof. Paul Neergaard (kvarfoje: 1956, 1962, 1967, 1975).

Ampleksa Loka Kongresa Komitato

Interalie pro la fakto, ke la organizaj laboroj okazas en du urboj – Sofio, sidejo de Bulgara Esperantista Asocio, kaj Varno mem – la Loka Kongresa Komitato de la 63a UK estas relative granda, kun dek tri membroj el Sofio, ses el Varno, KKS el Roterdamo kaj du sofiaj revizoroj. Prezidas s-ro Nikola Aleksiev, ĵusa eksprezidanto de BEA, kiu gvidis jam alian LKK (48a UK, Sofio 1963); vicprezidas s-roj Ĥristo Gorov, prezidanto de BEA, Nano Kjuĉukov kaj Georgi Dimov, ĉefo de la varna filio de LKK; ĝenerala sekretario estas s-ro Violin Oljanov de Sofio, sekretario s-ro Georgi Cvetkov de Varno, kaj kasisto s-ro Vasilka Petrova de Sofio. Pri la artaj aranĝoj de la 63a UK respondecas la multjara gvidanto de Bulgara Esperanto-Teatro, s-ro Kiril Draĵev.

Aliĝilo kaj unua bulteno disponeblaj

Stokoj de la aliĝilo kaj Unua Bulteno de la 63a UK estas mendeblaj ĉe la konstanta adreso de la UK. La unua periodo, dum kiu kotizoj estas plej malaltaj, daŭros ĝis la fino de 1977.



La 63a Universala Kongreso okazos en moderna kaj komforta marborda konstruaĵo: Kongresa kaj sporta palaco en Varno.

Belgio

- La 9an de oktobro, en Kalmt-hout okazis kolokvo pri la temo "Estanteco, estinteco kaj estonteco de la Esperanto-movado en Flandrujo". La partoprenantoj de la kunveno direktis rezolucion al la Estraro de UEA, salutante lastatempajn atingojn de la Asocio kaj proponante, ke similaj kunvenoj pri la strategio de la Movado baldaŭ okazu ankaŭ en aliaj lokoj kaj precipe je internacia nivelo.

- Tuta ĉeno de ekspozicioj pri la Esperanta literaturo komenciĝis la 15an de oktobro en la brusela kulturdomo por nederlandlingvanoj. La ekspozicio, kiu ampleksas pli ol 300 elektitajn librotitolojn, poste migros al la franclingva kulturdomo, internacia kaj junulara centroj kaj la universitato de la belga ĉefurbo. Ĉiu el la ekspozicioj ligiĝas al novaj Esperanto-kursoj. La serio finiĝos en Zamenhofa festo, planata por la 10a de decembro, kunlabore kun la Pola Ambasado en Bruselo, kun festparolado de prof. P. Janton el Francio.

Madagaskaro

- Antaŭ kelka tempo en Antananarivo okazis seminario de Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro. Unu el la ĉeftemoj de la diskuto estis, kiel plue agi por la disvastigo de Esperanto en la lando, geografie iom izolita de la internacia Esperanto-movado. Fine de aŭgusto okazis ankaŭ alia kunveno, dum kiu JEOM elektis sian novan estraron, kun s-ro D. Rabevazaha kiel prezidanto.

Pollando

- "Esperanto 49" estas la nomo de nova kampanjo en Pollando, kies celo estas organizi 49 korespondajn Esperanto-kursojn en 49 polaj vojevodioj (distriktoj). Post ĉ. 120 artikoloj kaj informoj en la pola gazeto kaj intervjuo de Andrzej Pettyn en la tutlanda televida programo, nun al la sidejo de Pola Esperanto-Asocio ĉiutage venas pli ol 200 aliĝpetoj por la kursoj.
- Antaŭ kelka tempo, Pola Esperanto-Asocio aperigis analizon de la rezultoj de enketo farita inter la

Esperanto-instruistoj de tiu lando. La enketo montris, ke en la lando aktivas pli ol 360 instruistoj, el kiuj 20 procentoj estas malpli ol 30-jaraj, 43 procentoj estas en la aĝo inter 30 kaj 60 jaroj, dum la ceteraj estas pli aĝaj. Iom pli ol duono de la pola Esperanto-instruistaro havas universitan instruistcon. La enketon prilaboris en formo de aparta broŝuro inĝ. B. Staszczak kaj mag. S. Kozłowski.

Nov-Zelando

- La 43a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazos en Palmerton North, ĉe la Universitato Massey, inter la 17a kaj 21a de januaro 1978. Informojn petu ĉe: NZEA, 78 Thackeray St., Upper Hutt, Nov-Zelando.

Koreo

- Nuntempe en 11 sudkoreaj universitatoj kaj altlernejoj okazas Esperanto-kursoj. Kvankam ekster la oficialaj programoj, la kursoj okazas kun permeso de la ministerio pri edukado. Esperanto-kursoj okazas ankaŭ en pluraj mezgradaj lernejoj.

FR Germanio

- Stratoj kaj placoj nomitaj laŭ Esperanto aŭ d-ro Zamenhof ne plu estas maloftaĵo kaj ni tial malofte notas tiajn novaĵojn. Tamen, estas menciinde, ke antaŭ kelka tempo en Frankfurto inaŭguriĝis tri tiaj stratoj samtage: "Ludwig-Zamenhof-Weg", "Esperanto-Strasse" kaj "Carl-Berthel-Weg" (laŭ la fondinto de la loka Esperanto-societo, ĉe kiu d-ro Zamenhof dufoje gastis).

Nederlando

- Nederlando havas grandan elekton de Esperanto-organizaĵoj, sed en iliaj renkontiĝoj kaj kunvenoj malofte vidiĝas junaj vizaĝoj. Fakte, Nederlanda Esperanto-Junularo estas memstara unuiĝo, kiu lastatempe viciĝas inter la plej aktivajn movadajn organizaĵojn en la lando. En ĝia lasta renkontiĝo, kiun kunorganizis ankaŭ Germana Esperanto-Junularo, en Lage Vuursche inter la 21a kaj 23a de oktobro, partoprenis 85 gejunuloj. La ĉeftemo estis kulturaj rilatoj inter la du landoj; parolis ankaŭ la kultura ataŝeo de FR Germanio.

Soveta Unio

- En du junularaj esperantistaj tendaroj, kiuj antaŭ nelonge okazis en Soveta Unio, partoprenis pli ol 300 personoj.



- En Soveta Unio ĉiujare okazas tuta aro da tendumaj kaj aliaj aranĝoj, ĉefe por la gejunuloj esperantistoj. Eble unika inter tiuj aranĝoj estas la tradicia boatado, kiu ĉi-jare okazis la sepan fojon, sur la lagoj Ignalina, apud la urbo Vilnius.

Britio

- Laŭ la deka jara raporto de Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo, ĝia kapitalo jam superis la sumon de dek mil britaj pundoj. La interezoj je tiu kapitalo ĉiujare estas dividataj en formo de subvencioj al britaj kaj eksterlandaj gejunuloj por fari prelegvojaĝojn kaj studvizitojn. Inter la

ĉi-jaraj ĝuintoj de tia subvencio troviĝis ankaŭ s-ro Ian Jackson, kiu pasigis tri monatojn en la Centra Oficejo de UEA, kiel volontulo. S-ro Jackson, kiu nun gvidas novan Esperanto-klubon en la Universitato de Kembriĝo, ĝuis subvencion de la sama fondaĵo ankaŭ pasintjare por sia vojaĝo al la Universala Kongreso en Ateno.

Detalojn bonvolu peti ĉe: s-ro J.P. Boulet, 7 avenue du Forez, F-63800 Cournon d'Auvergne, Francio.

- La nederlanda muzikisto Dirk Schipper estas esperantisto kaj komponis je Esperantaj tekstoj diversajn muzikaĵojn por ĥoroj. Pluraj el ili estis elsenditaj en la programoj de la nederlanda radio kaj ricevis bonajn prijuĝojn. Interesitoj povas skribi al: s-ro D. Schipper, Orionlaan 80, Hilversum, Nederlando.

Interlingvistiko

- Grava anglalingva artikolo de prof. d-ro J. Balbin aperis en la ĵus eldonita jarkolekto de la revuo *Geolinguistics*, organo de la Usona Geolingvistika Societo. Tiu revunumero kun la artikolo "Lingvo-planado kaj planitaj internaciaj lingvoj" estas aĉetebla por 5,- usonaj dolaroj ĉe: American Society of Geolinguistics, Room 224, 120 East 184th Street, Bronx, N.Y. 10468, Usono.

Informado

- Sveda Esperanto-Federacio povus multon instrui al la resto de la Movado pri moderna, enhave kaj teknike altnivela, informado pri la Internacia Lingvo. SEF ĵus denove eldonis specialan numeron por 1977/78 de sia nacilingva grandformata informilo *Esperantonytt*. Tiu riĉe ilustrita grafika belaĵo enhavas dekon da artikoloj, kiuj prezentas diversajn aspektojn kaj novaĵojn pri Esperanto kaj ĝia vivo. La gazeto aperis en 50 000 ekzempleroj, kio ankaŭ kvante metas svedojn ĉe la pinto.

Someraj universitatoj

- Por la 31a sesio de Internacia Somera Universitato, kiu okazos en la kadro de la 63a Universala Kongreso venontjare en Varno (Bulgario), universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj povas proponi prelegojn al la sekretario de la Komisiono pri ISU: prof. S. Kawamura, 424-7 Kinasityo Huzii, Takamatu, 760 Japanio. La prelegproponoj (kun mallonga resumo, biografio, bibliografio kaj foto de la proponanto) atingi la sekretarion antaŭ la 15a de januaro 1978.

- En Lieĝo (Belgio), inter la 6a kaj 27a de aŭgusto 1978, okazos la 4a sesio de Someraj Universitataj Kursoj (SUK), kun lekcioj pri astronomio, psikologio kaj literaturo. Pliajn informojn bonvolu peti ĉe: SUK, B.P. 9, B-4000 Liège, Belgio, kie oni povas mendi ankaŭ la kurslibrojn de la antaŭaj sesioj de SUK.

Unesko

- En la lastatempe eldonita 94-paĝa kolekto de salutmesaĝoj okaze de la 30a datreveno de Unesko, la unua inter la salutoj de la neregistaraj organizaĵoj estas tiu de UEA, sendita de la pasintjara UK en Ateno.

Muziko

- Okaze de la 70a franca nacia kongreso de Esperanto, de la 12a ĝis la 16a de majo 1978 en Clermont-Ferrand, oni aranĝos konkurson pri kanzonoj en Esperanto. La konkurso okazos la 13an de majo en la urba teatro de Clermont-Ferrand kaj oni antaŭvidas valorajn monpremiojn de 1000, 1500 kaj 2000 francaj frankoj.

Sadler

- D-ro Victor Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, meze de oktobro flugis al Irano por dusemajna libertempo. Fakte, temas pri io, kion ni en la Oficejo nomas "utilaj libertempoj", ĉar inter la celoj de tiu privata vojaĝo estas ankaŭ la deziro surloke konatiĝi kun la viglega Esperanto-agado en tiu lando. Simile, utilajn libertempojn pasigis dum la lastaj tri jaroj ankaŭ la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kiu "feriis" en Danlando en 1975, en Greklando en 1976 kaj en Islando en 1977, dum pluraj semajnoj antaŭ la Universalaj Kongresoj en tiuj landoj.

Weide

- S-ro August Weide, malnova Esperanto-aktivulo el Hamburgo (FR Germanio), nun restadas en la sudkorea ĉefurbo Seŭlo. Kvankam jam 73-jara, kiel unu el la plej spertaj Ĉe-metodaj instruistoj, li iris al Koreo propra-koste kaj speciale por helpi en la vigla Esperanto-instruado tie. El la unua raporto vidiĝas, ke li jam meze de oktobro faris plurajn paroladojn kaj malfermis kurson en la Universitato Danguk por 150 studentoj. Pro manko de instrumaterialo, s-ro


Persone



Weide petas bonvolan alsendon de ĉiaspecaj E-libroj, afiŝoj, informiloj ktp. La adreso: s-ro A.W., Universitato Danguk (Biblioteko), Jongeangu, Seŭlo 140, Koreo.

Williams

- S-ro Norman Williams, honorofica administranto de Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo en Britio (vidu ankaŭ p.196), antaŭ kelka tempo ricevis altan distingon de Rotario Internacia ("Paul Harris Fellow") pro sia multjara aktiveco ankaŭ por la menciita fondaĵo.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1977, p. 66. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 25.42 m (11800 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840kHz). I.P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 40m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710kHz), 25.42m (11800kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63 m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radio-vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.
20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 49.34m (6080 kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz). Ripeto de la lunda programo.

Merkrede

18.00-18.10 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

17.50-17.55 Vieno, 203m (1475 kHz). I.
21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

Vendredo

18.00-18.10 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.
20.00-20.30 Pekino, 43m, 33m, 31m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 05.30 ĝis la 06.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 16.30 ĝis la 17.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49m, 41m; 2) dum la svedlingva programo ĉiun duan mardon de la 16.00 ĝis la 16.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 19.30 ĝis la 20.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; 3) dum la danlingva programo sabate de la 14.30 ĝis la 15.00 kaj de la 19.30 ĝis la 20.00, dimanĉe de la 15.30 ĝis la 16.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.
b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno, Zagrebo, Ibra Radio.
c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj).
ĉ) Stacioj aŭdeblaj en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (31.28m, 25.60m, 25.27m, 19.60m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 13

(pri la demando v. nian oktobran numeron, p. 180)

1. Ligia aŭ Callina, filino de reĝo de la barbara liga popolo, kiu estis sendita al Romo de sia patro kiel garantiulin. En *Quo Vadis* Henryk Sienkiewicz (1846-1916), la plej populara pola romanverkisto kaj Nobel-premiito, priskribas la vivon de la fruaj kristanoj en Romo dum la regado de imperiestro Nero. Lidia Zamenhof, filino de d-ro L.L. Zamenhof, tradukis la romanon en Esperanton en 1933.

2. Colomba, "kruela heroino, la enkarnigo de la ĝismorta korsika venĝemo", donas sian nomon al *Colomba* verkita de Prosper Mérimée (1803-1870), franca majstro de la novelo kaj mallonga rakonto. La romano temas pri tradicia familia kverelo en Korsiko dum la pasinta jarcento. J. Beau faris la tradukon el la franca originalo en 1938.

3. Feodosia Nikolavna aŭ Fenička, kunulino kaj poste la dua edzino de Nikolao Petroviĉ Kirsanov. Ili rolas en *Patroj kaj filoj* de Ivan Turgenev (1818-1883). Ĝi estas majstroverko en la ĝenro de la socia romano kaj reliefigas ne nur la antagonismon inter du generacioj, sed inter du mondoj kaj vidmanieroj. Kazimierz Bein (Kabe) elrusigis la verkon en 1909.

4. Margareta Celsing aŭ majoredzino Samzelius. Ŝi aperas kiel la "majorino" sur la paĝoj de *Gösta Berling*, ĉefverko de la sveda Nobel-premiito Selma Lagerlöf (1858-1940). La aŭtorino rakontas la aventurojn de la eksigita pastro, Gösta Berling, kaj la malriĉaj, diboĉantaj kavaliroj de la bieno Ekeby en Vermlando, sia hejmmregiono. Stellan Engholm esperantigis la romanon en 1934.

5. Marta Swicka, ĵus vidviniĝinta juna patrino, kiu alfrontas la problemon trovi vivrimedojn por si kaj

sia filineto. La romano *Marta* estis verkita de Eliza Orzeszko (1842-1910), romantika kaj progresema pola verkistino, kiu okupiĝis pri la kondiĉoj de la virino en la socio. La Esperanto-traduko, eldonita en 1910, estis farita de d-ro L.L. Zamenhof.

DEMANDO 14

(la respondo aperos en nia decembra numero)

Kvankam porpacaj agadoj estas unu el la karakterizaj trajtoj de la Esperanto-movado, kelkfoje la movadanoj uzas, en figura senco, militajn esprimojn, tiel aludante la fortojn bezonatajn por superi malfacilaĵojn kaj atingi la celon. Jen kelkaj ekzemploj el la originala poezio de d-ro Zamenhof: "kolektiĝas pacaj batalantoj" (*La Espero*); "La venko — baldaŭ ĝi venos" (*Al la fratoj*); "Antaŭen kun pacaj armiloj!" (*Preĝo sub la verda standardo*). Lastatempe aperis la rezultoj de statistika analizo de vortoj en kelkaj prozaj tekstoj de Zamenhof, kaj inter la unua dekduo laŭ plej ofta uzado estas **batalado** kaj **batalanto**.

Tamen, en la historio de la Movado rolis ankaŭ profesiaj soldatoj, viroj havantaj armeajn postenojn. Plej ofte ili montris elstaran organizan kapablon kaj profundan scion pri la maniero trakti kaj direkti diverstendencajn homamasojn. Cetere, iliaj influhavaj kontaktoj kun registaraj funkciuloj kaj aliaj homoj en ŝlosilaj pozicioj rezultigis gravajn antaŭenpaŝojn por la Movado sur la loka kaj internacia niveloj.

Se oni povus arigi en unu tendon sur la verda batalkampoj la plej eminentajn el tiuj soldatoj, oni havus tre imponan internacian oficiran stabon. Tiu ĉi demando temas pri kvin oficiroj, kies multifacetaj agadoj en la Movado pravas, ke ili vere estis "pacaj batalantoj", ne nur kiel organizantoj, sed ankaŭ kiel kontribuantoj al la Esperanto-kulturo. Ĉu vi povas identigi ilin surbaze de la sekvaj helpiloj?

1. Inter ili estas 2 majoroj, 1 kapitano kaj 2 koloneloj, kvankam dum ilia agado kiel esperantistoj, kelkaj promociiĝis aŭ akiris alian rangon en aliaj cirkonstancoj.

(v. daŭrigon sur p. 200)

Oficiala Informilo

N-ro 510

ŜANĜO DE KOTIZPERANTO EN ISRAELO

Pro okupiteco eksiĝis en la ofico de Peranto por Israelo s-ro A. Kuppermann, al kiu ni dankas pro la plurjara kunlaboro. La nova Peranto estas s-ro Reuven Berlinerblau, 134, Aĥad-Haam-str., IL-64 253 Tel-Aviv.

NOVA KOTIZPERANTO POR USONO

Niaj membroj en Usono bonvolu noti, ke estonte ĉiuj kotizoj kaj aliaj pagoj por UEA estu adresitaj al: UEA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. La ĝisnuna kotizperanto, la ĉefdelegito s-ro Armin Doneis, post okjara servo devis retiriĝi el la ofico pro malsano. Provizore la landa asocio, ELNA, mem transprenas la administradon por UEA, ĝis ĝi povos nomi novan ĉefdelegiton. Al s-ro Doneis ni direktas varman dankon pro la grandega laboro plenumita por la Asocio, precipe en la lastatempaj malfacilaj kondiĉoj, kiujn kaŭzis lia sanstato.

SOCIETO ZAMENHOF 1977

JAP: 226 S. Yamazoe. US: 227 John L. Lewine.

DONACOJ 1977 (Gld.) ĝis la 30a de septembro

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: Gasto de RM 150,00; H.C. Timmer 10,00. Sumo ĝisnuna: 1697,53.

ĜENERALA KASO: Aŭstrio: F. Casar 7,53. Finnlando: Finnlandano 100,00. Usono: J.L. Lewine 29,40. Anonima 50,00. Sumo ĝisnuna: 4658,61.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1977: 21 F. Assolinario Dias, Brazilo.

UNESKO-KAMPANJO: Belgio: G. Wolff 500,00. FR Germanio: H. Bily 70,00. Nederlando: H. Bakker (filo) 50,00; ges-roj Bossong 50,00; E.S. Otto 250,00; A.M.E. van Walsum-Schutte 150,00. Svedio: K.E. Gustafsson 76,13. Sumo ĝisnuna: 4254,38.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

2. Kvar naskiĝis en la 19a, unu en la 20a jc. Ĉiuj mortis en la 20a jc.
3. Ili komencis sian karieron en la armeoj de Belujo, Britujo, Francujo, Hispanujo kaj Rusujo. Krom tio, po du militservis en kolonioj en Afriko, unu en Hindujo kaj unu fariĝis oficiro ankaŭ en Usono.
4. Tri estis prezidantoj de la unuaj gravaj Esperanto-organizaĵoj en siaj landoj. Unu helpis organizi la 3an Universalan Kongreson kaj unu organizis Esperanto-grupojn en alia lando, en kiun li migris.

5. Tri estis anoj de la Lingva Komitato, fondita en 1905 okaze de la 1-a Universal Kongreso.
6. Kvar eldonis aŭ redaktis Esperanto-revuojn.
7. Tri dediĉis sin al tradukado el la nacilingva literaturo aŭ al verkado de originalaĵoj en Esperanto. Unu provis reformi Esperanton kaj inventis sian propran planlingvan projekton.
8. La komencliteroj de la vok- kaj familinomoj estas: JP, CL, VI, FP kaj JR.

JOSEF WOHLBERG

En Natania, Israelo, la 10an de julio forpasis la tiea delegito kaj fakdelegito de UEA Josef Wohlberg (1907-1977), kiu dum duona jarcento aktivis en la Esperanto-movado.

HUBERT FEREZ

En Nico (Francio), meze de septembro forpasis Hubert Ferez (1896-1977), unu el la plej viglaj propagandistoj de Esperanto en Francio, i.a. fondinto de grandformata informagazeto *La Tribune Espérantiste*, kun eldonkvanto de 20 000 ekzempleroj. Li laboris por la fondo de similaj lingvaj gazetoj ankaŭ en aliaj landoj. Multan energion li dediĉis al la proksimigo de germanaj kaj francaj rondoj en Strasburgo, kie li antaŭe vivis. Ferez ankaŭ multe instruis la Internacian Lingvon, i.a. en popoluniversitatoj.

STEFANO RAGONCZA

Laŭ *Budapeŝta informilo*, fine de aprilo ĉi-jare, subite forpasis Stefano Ragoncza (1923-1977). Li estis aktiva esperantisto dum pluraj jaroj kaj i.a. funkciis kiel fakdelegito de UEA en la hungara ĉefurbo.

Nekrologoj

RUDI GRAETZ

En Berlino, la 1-an de oktobro, forpasis Rudi Graetz (1907-1977), prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko kaj komitatano de UEA. Li lernis Esperanton jam kiel junulo kaj estis elstara aktivulo, precipe en la laborista Esperanto-movado inter la du mondmilitoj. Post la revigliĝo de la Movado en GDR, ekde 1965, Graetz estis ĝia ĉefa organizanto kaj reprezentanto en multaj Universalaj Kongresoj kaj aliaj internaciaj kunvenoj. Li estis funkciulo ankaŭ en MEM; liaj artikoloj ofte aperis en *Paco kaj Der esperantist*.

AHMED JAZDANI

La 5an de julio en Teherano mortis Ahmed Jazdani (1892-1977), dumviva membro kaj dum pli ol kvindek jaroj apoganto kaj delegito de UEA.

T. LEIVO-LARSSON

La 1-an de aŭgusto en Finnlando forpasis s-ino T. Leivo-Larsson (1902-1977), ambasadoro kaj malnova esperantisto, lastatempe ankaŭ membro de Societo Zamenhof de UEA.

BERNHARD SWARSENSKY

En Israelo, la 26an de aŭgusto mortis Bernhard Swarsensky (1907-1977), multjara aktiva esperantisto kaj antaŭa delegito de UEA en Herzlia.

WALERIAN WŁODARCZYK

Post nelonga malsano, la 5an de septembro, en Varsovio forpasis mag.

Walerian Włodarczyk (1933-1977), ĵurnalisto kaj verkisto. Libroforme aperis en Esperanto lia 150-paĝa kolekto de eldiroj de polaj famuloj pri la Internacia Lingvo, *Esperanto?* (1964) kaj lirika poemaro *Mio mia* (1965). Li faris plurajn vojaĝojn kaj prelegis en fakaj internaciaj kunvenoj. Lastatempe li estis laboranta super doktora disertaĵo pri Esperanta temo.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Kontakton kun kluboj kaj kolektantoj de maksimumaj kartoj serĉas Luis Vicino, Maza 1450, 1240 Buenos Aires, Argentino.

Por letervespero komence de decembro salutoj el la tuta mondo bonvenaj, prefere sur bildkartoj. Klubo Esperantista de Malmö, Kronetorpsgatan 94, S-212 27 Malmö, Svedujo.

Por propagandi Esperanton inter labor-sindikatoj, esperantista rondo de la Tutlanda Telekomunikista Laborsindikato serĉas laboriston de telefon-centralo aŭ de relaksa stacio, ĉu oficist(in)on, ĉu inĝenier(in)on, kiu estas preta sciigi al ni sian ĉiu-

tagan vivon, laŭ maniero formulita de ni. Bonvolu peti informon ĉe: s-ro Hiroŝi Arai, Ooaza-kami 1366-1, AGEO, 362 Japanio. Respondo kaj honorarieto garantiataj.

Filatelan interŝanĝon proponas Luis Vicino, Maza 1450, 1240 Buenos Aires, Argentino.

Gastfilino (au pair) bezonata por tri-infana familio. Mi donos poŝmonon (proks. £10) kaj libertempon por lernado/studado. Patrino ankaŭ laboras hejme. Skribu al: Ges-roj Jakŝiĉ, 16 Bollo Bridge Road, Acton, London W3, Anglujo.

Prelegvojaĝu en Francio novembre aŭ februare. Faru proponojn al UFE-sekretario, Renée Triolle, 2 bd de Douai, F-59100 Roubaix, Francio.

Korespondi kun la universitataj aŭ lernejoj Esperanto-grupoj deziras: Esperanto-klubo de Ŝizuoka universitato, p/a Ŝizuoka-Daigaku, 836 Ooya, Ŝizuoka-ŝi, 422 Japanio.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la Koresponda Servo Mondskala de UEA. Adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.

solvopropoj

por internaciaj problemoj restas ĉiam aktualaj ĝis okazos solvo!

serio internacia diskutejo

- | | | |
|---|---|---------|
| 1 | senriproĉa monda monsystemo kun valorstabila ŝparmono | ös 45.— |
| 2 | internacia aboco por nomoj kaj fremdvortoj | ös 54.— |
| 3 | tuja forigo kaj evito de inflacio | ös 54.— |

d-ro jözef hartl, poŝtgirkonto 7 503.218
franc jözefs khee 31, a 1010 viin, ööst.

fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

NOVA BIOLOGIA NOMENKLATURO (NBN)

Sciencaj nomoj de bestoj kaj plantoj kunmetitaj per terminoj el la Internacia Lingvo Esperanto.

La asocio por la enkonduko de nova biologa nomenklatur, Hertendreef 12, B-2180 Kalmt-hout, Belgio, uzas kvar lingvojn por konigi tiun sistemon inter sciencistoj. Partoprenu en ĝia laboro! Membroj en pli ol 30 landoj.



KONTAKTO
revuo por ĉiu
sezono

KONTAKTO
pri temoj plej
diversaj

KONTAKTO
la bela revuo
de TEJO

En Kontakto 53 (1977:1):

• *Blanka nuboj*: la nuklea debato en Nov-Zelando. • *Seveso* — *unu jaron poste*: ekologia katastrofo en Italio. • *Kolonioj en la kosmo*: elirvojo por la homaro? • *Religio kaj futuro*. • *La Esperanto-komunumo* "Bona Espero": raporto de nova komunumano. • *Poitiers en la fokuso*: fotoj pri la 33a Internacia Junulara Kongreso.

HEROLD

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 56 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 400 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, boîte 28, B-1000 Bruselo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

STAR LINE IRAN CO

استارلاين-ایران

STAR LINE estas kompanio kies proprieto estas centprocente irana, kiel ankaŭ plejparte ĝiaj laborantoj, inter kiuj tamen troviĝas usonanoj kaj eŭropanoj kun specialaj kapabloj kaj spertoj. Ili komprenas martransporton el la vidpunkto de kargo-eksportistoj kaj -importistoj, kaj ankaŭ el la vidpunkto de enlanda transporto en Irano kaj aliaj landoj kie STAR aktivas.

Ni, la unuaj, en 1974 enkondukis en Iranon aŭtopramojn en- kaj el-vetureblajn. Ni estis la unuaj ankaŭ por enkonduki komplete kontenerajn ŝipojn el EŬROPO (Felixstowe, Hamburgo, Roterdamo, Antverpeno, Livorno), USONO kaj KANADO (Houston/Galveston, Norfolk, Baltimore kaj Novjorko) al Irano (Bandar-Shahpour).

Gvidantoj de la irana ŝipindustrio, STAR LINE IRAN CO. antaŭplanis alfronti la defion de la Kontenera Epoko en Irano.

Nia kontenera deponejo en Bandar-Shahpour posedas la plej modernajn kaj efikajn rimedojn por kontenero-manipulado. Pro tio la jenaj servoj estas haveblaj:

TRADOGANIGO SUBDOGANA DEPONEJO
RAPIDA KAJ FIDINDA LIVERO AL ĈIU PARTO DE IRANO
LA PLEJ BONA KONTENERA DEPONEJO EN IRANO

Atentu STAR LINE IRAN CO. kaj vi spertos novajn paŝojn en ŝipkomerco, en kargo-manipulado kaj plenan dediĉon al KLIENTOSERVO.

Voku nin: 685042-685043
 681020-687834

STAR LINE IRAN CO.
Gandhi Avenue No.21, 14th Street
KHORRAMSHAHR TEL: (0651)2740

Agentoj: USONO: STAR LINES SHIPPING COMPANY INC., 77 Walter St.,/N.Y. 10005/N.Y. Telex: 128-202. Tel. (212) 425-5555.
BRITIO: STAR LINES EURO CONTAINER SERVICE — 1, Balfour Place, London W1Y 5RH. Telex: 851-23987. Tel. 01-629-2257.